

1978 novembro

71-a jaro


n-ro 875 (11)

aperas monate (escepte de aŭgusto)


esperanto

NE ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176 — 3015 bj rotterdam — nederlando



**Komuni-
kado en
la mondo:
Por kiu la
signaloj?**



Vi trovos

atenton al iuj temoj en ĉi tiu numero, kiuj estas kvazaŭ tabuaj en la Esperanto-movado. Ni ne celas la enkondukan tekston pri la movada rilato al homaj rajtoj, kie oni unuavice pledas por diplomatia anstataŭ pasia traktado de tiu grava, sed tikla, demando de la aktuala internacia vivo. Kiel tabuo aŭ herezaĵo povus montriĝi kelkaj ideoj en la teksto pri la lingvoproblemo en Eŭropo. Tie oni mencias aliajn eventualajn kandidatojn por la rolo de internacia komunikilo. Ni en la Movado ankoraŭ ĉiam restas tro pasiaj eĉ ĉe nura mencio de tiaj eblecoj, eĉ kiam oni tuj dementas la realigeblon de tiaj ideoj. Tia movada rilato, tiu ekzisto de tabuaĵoj, povas nur malfortigi niajn argumentojn kaj poziciojn en la ekstermovadaj medioj. Tamen, vi povas eĉ malatenti tiun nian atenton al "tabuaĵoj", ĉar la numero enhavas sufiĉe da alia inspira materialo.

Enhavo

- 189 Renkonte al la Semajno de Homaj Rajtoj kaj Esperanto (1978 12 10 – 15): Esperanto mem estas homa rajto (S. Milojević)
- 190 Kongreso en Pakistano
- 191 Postnotoj pri la aŭgusta vojaĝo de la prezidanto de UEA: Helpe de sep mejlaj botoj
- 192 Fakaj medioj: Sciencaj studoj en prestiĝa revuo
- 193 Landa agado: Kio nova en Rumanio? (S.M.)
- 194 Pupteatra Internacia Festivalo: Tamen kritike pri sukceso (Roger Imbert)
- 195 Lingvoproblemo en Eŭropo: Eŭropa integriĝo kaj lingva justeco (Ilmar Tammelo)
- 196 Kvardek miliona kaoso
- 197 Reagoj: Wüster kaj Drezen (Marcel Delcourt kaj Jean Amouroux)
- 199 Recenzo: "Slovaka antologio" (William Auld)
Belartaj Konkursoj 1978, Originala poezio, Tria premio: La turoj de l' ĉefurbo (Mauro Nervi)
- 200 Recenzoj: "La revizoro" (Rejna de Jong); "Halina-dokumento pri la studentaj jaroj de L.L. Zamenhof" (N.Z. Maimon); "Ĉevalido transiras riveron", "Ruza griza lupego", "Vilaĝano el Poltavo" (Eliza Kehlet)
- 201 Laste aperis. . . (novaj eldonaĵoj en aŭ pri Esperanto); Anonco
- 202 TEJO-paĝo: Eksteraj rilatoj de TEJO: KER – mallongigo kun tasko-amplekso (Ian D. Tarrant); Agrable, sed. . . (I. J.); Homaj rajtoj en IS
- 203 Anonco
- 204 Loke – Fake – Persone (mallongaj novaĵoj)
- 205 Oficiala informilo el la Centra Oficejo de Universala Esperanto-Asocio
- 206 Ekzameno E (Bernard Golden)
- 207 Anoncetoj; Anonco
- 208 Anonco

La kovrilo

Nia enigma kovrilo, kun demando pri la monda komunikado, evidente temas pri nekomunikado. Ni ŝuldas la desegnaĵon al s-ro Geoffrey Moss, konata usona artisto, kiu afable permesis al ni unufojan publikigon de ĝi. Atentu, do, la desegnaĵo estas kopirajta, kio kutime ne estas la kazo kun la tekstoj kaj ilustraĵoj en nia revuo. Sed la signaloj de la maristo kun flagoj, por kiu ili estas? Kiu cetere estas la maristo, kaj kiu la ursvizaĝa kravatulo, kun stranga amplifilo anstataŭ simpla kaj sobra rigardo? Kien rigardas la homamaso en la fono? Kion predikas la duo de sur la "pop-arta" podio? Nu, provu mem respondi la demandojn. Eventuale, helpe estus unue legi la tekston sur la paĝoj 195 – 197 aŭ simple iom mediti pri la Movado kaj mondo, kies parto vi estas aŭ devus senti vin. Sukceson, do, en ĉi tiuj komunika ludo kaj malkomunika mondo!

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.
Telefona: (010) 36 15 39.

Aperas monate (escepte de aŭgusto).
Fondita en 1905 de M. P. Berthelot (1881-1910). Legantoj en 86 landoj.
Redaktoro: Simo Milojević.

Abonprezo por unu kalendara jaro: 33,00 gld. (kun membreco kaj Jarlibro 55,— gld). Unuopa ekz. 3,— gld.

Anonctarifo: 1p. 500 gld. 1/2p. 265, 1/4p. 145, 1/8p. 85, 1/16p. 55 gld. Nemovadaj komercaj entreprenoj pagas duoble. Anoncoj sur la ekstera kovrilpaĝo kosta duoble. Ripetrabato 20%.

Banko: Bank Mees & Hope, Coolsingel 93, 3012 AE Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804).

Poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).

Telegramadreso:
ESPERANTO ROTTERDAM.

Estraro de UEA

Prezidanto kaj estrarano pri eksteraj rilatoj kaj la Financa Programo: d-ro Humphrey Tonkin, 35 Violet Lane, Lansdowne PA 19050, Usono; telefono (215) 259 8821.

Vicprezidanto kaj estrarano pri informado kaj kulturo: mag. William Auld, 20 Harviestoun Road, Dollar, Clacks., FK14 7HG, Britio; telefono (02594) 2339.

Vicprezidanto kaj estrarano pri faka agado kaj la delegita reto: prof. d-ro Carl Støp-Bowitz, Camilla Colletts vei 3, Oslo 2, Norvegio; telefono (02) 44 80 85.

Ĝenerala sekretario kaj estrarano pri planado: d-ro Werner Bormann, Schärstr. 26, D-2050 Hamburg 80, FR Germanio; tel. (040) 7384508.

Estrarano pri landa kaj regiona agado: s-ino Ursula Grattapaglia, Caixa Postal 04-0097, BR-70000 Brasília, Brazilo.

Estrarano pri administrado, financoj kaj specialaj taskoj: s-ro Grégoire Maertens, Pr. Leopoldstraat 51, B-8310 Brugge, Belgio; telefono (050) 35 49 35.

Estrarano pri edukado: s-ro Andrzej Pettyn, skr. poczt. 46, PL-05-710 Miłanówek, Pollando; tel. 58-37-08.

Estrarano pri kongresoj kaj turismo: d-ino Flora Szabó-Felső, Zója u. 5/b VII.22., H-7624 Pécs, Hungario.

Esperanto mem estas homa rajto

Ĉi tiu titola frazo enestis la prezentotekston (en "Vi trovos") por la ĉefartikolo de nia oktobra numero. Emfazcele, ni nun revenas al tiu frazo, renkonte al la Semajno de Homaj Rajtoj kaj Esperanto, inter la 10a kaj 15a de decembro ĉi-jare.

KROM la eksplicita mencio de la lingvo en la Artikolo 2 de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj, la lingvo aŭ lingva egaleco implicate ĉeestas preskaŭ en ĉiuj aliaj artikoloj de la Deklaracio. Ankaŭ la vivo mem plektas la lingvon en ĉiujn siajn manifestiĝojn kaj strebojn. Same kiel la lingvo estas ĉie en la homa vivo, tiel ankaŭ la lingva egalrajteco estas subkomprenata premiso, sen kies plenumiĝo neniue el la homaj rajtoj de la Deklaracio povas plene realiĝi. Se ne estus tiel, tiam la Universala Deklaracio prezentigis nun al ni kiel arkaikiĝinta dokumento, kiu parolas pri iu antaŭa, antikva aŭ mezepoka tempo, kiam estis eble dum unu tuta homa vivo ne renkonti fremdulon kaj ne sperti la lingvo-problemon. Sed estas male: la Deklaracio estas moderna dokumento, kiu rilatas la nunan – ankaŭ la estontan – mondon, kie ne plu ekzistas ekonomiaj, politikaj kaj sekve ankaŭ lingvaj insuloj de izolo kaj memsufiĉo. Nur se ni akceptas

tian interpreton de la Deklaracio, tiun subkomprenatan ĉeeston de la lingva egalrajteco, la grava dokumento, de kies proklamo ni festos la 30an datrevenon en decembro, prave fariĝas ankaŭ nia dokumento kaj parto de niaj streboj kaj laborplanoj.

Dum kelkaj lastaj jaroj, la demando de homaj rajtoj fariĝis ofta ero en la tagordoj de internaciaj konferencoj, prestiĝarmilo en la grandpotencaj intertraktadoj, politika modo, marĉanda rimedo pli ol celo, okaza kampanjo anstataŭ konstanta idealo. Kiel parto de ĉi tiu mondo, ankaŭ iuj esperantistoj kaptiĝis de tiu modo kaj komencis serĉi iujn movadajn martirojn en diverstendencaj homrajtaj dosieroj kaj nomlistoj. Tiel ili volas al la Movado trudi la penson, ke tia moda plektiĝo en la aktualan mondpolitikon estas la sola maniero ligiĝi al la noblaj preskriboj de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj. Tio estas tordo de la reala bildo de la nuntempa Esperantomovado, ĉar batali por Esperanto signifas batali por lingva egaleco, por digno kaj maldiskriminacio en la homa komunikado, do por tiuj implicitaj lingvaj (homaj) rajtoj el la Deklaracio. Kiam ni do laboras por Esperanto, ni jam per tio troviĝas en la mezo de la batalkampo por la homaj rajtoj.

Ĉu ĉio ĉi signifas, ke unuopaj kazoj el la homrajtaj kampanjoj ne devus interesi nin? Ne, ni ne volas diri tion. Ni povas interesiĝi pri tiaj kazoj kiel civitanoj, kiel eventualaj membroj de diversaj politikaj kaj sociaj grupiĝoj, sed ne kiel membroj de la Esperantomovado. Kial ne? Nu, ĉar tio estas la plej sekura maniero, ke la Movado kiel tuto evitu fariĝi parto de politikaj intrigoj kaj maltrafu danĝerajn politikajn etikedojn, kiujn la oficiala mondo – ekzistas ja ankaŭ io tia – emus atribui al ni. Ne, ankaŭ tial, ĉar, dum ni okupiĝos pri politikaj aspektoj de homaj rajtoj, neniue faros nian parton de la homrajta laboro – klerigos la mondon pri la lingva problemoj kaj emfazos ĝiajn ligojn al kaj fundamentan gravecon por la plenumiĝo de la homaj rajtoj kiel tuto.

Jam dum multaj jaroj – ankaŭ sur la paĝoj de ĉi tiu revuo – ni daŭre atentigas, ke la lingva problemoj senĉese akriĝas kaj kondukas la mondon al plena komunika kaoso aŭ al kultura, anstataŭ politika, koloniismo. Ne laste, ankaŭ pro nia laboro tra jardekoj, ekstermovadaj instancoj komencas ĉiam pli serioze atenti la lingvan problemon (vidu pri tio kelkajn aliajn kontribuadojn ankaŭ en ĉi tiu revunumero). Ni memoru, tamen, ke ĉio ĉi signifas, ke nia laboro por Esperanto devas adekvate intensiĝi. Ni ne estas multaj, kaj la mondo estas ankoraŭ vastega, malgraŭ tio, ke ĝi senĉese interproksimiĝas kaj unueciĝas. Ni do ne fordiboĉu niajn limigitajn fortojn facilanime. Ni utiligu la Semajnon de Homaj Rajtoj kaj Esperanto por atentigi la mondon, ke tiu apudmetiteco de homaj rajtoj kaj Esperanto en la nomo de la Semajno ne estas sensignifa hazardaĵo. Ni klarigu al la ekstermovadaj medioj, ke la batalo por Esperanto estas nia movada kontribuo al la tutmonda lukto por la homrajtaj idealoj, ke neŭtrala internacia komunikilo estas la funda-




Labordivido: Konferenco de specialigita organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj, kie oni eventuale pledas ankaŭ por niaj politikaj kaj sociaj rajtoj. Ni en la Movado batalas por la observado de la lingvaj rajtoj en ĉi tiaj konferencoj de UN.

mento mem de preskaŭ ĉiuj aliaj homaj rajtoj en tia mondo, kiel tiu en kiu ni nun vivas. Ĉar, kion signifas — sen lingva egalrajteco — terminoj kiel: libereco de opinio kaj esprimiĝo, jura egaleco, protekto kontraŭ diskriminacio, libereco vojaĝi en- kaj ekster-lande, rajto peti informojn, rajto je laboro, rajto je edukiĝo, rajto partopreni la kulturen vivon, rajto ĝui la artojn, rajto partopreni sciencon progreson kaj ĝiajn fruktojn . . . ? En la nuna mondo centoj da milionoj da homoj vivas provizore aŭ konstante ekster siaj ge-

patralingvaj teritorioj. Eble tuta miliardo da homoj ĉiujare pro turismaj aŭ aliaj celoj transiras landojn kaj eĉ pli ofte lingvajn limojn. Kion do signifas la ĉi tie vicigitaj homaj rajtoj, sen la rajto je lingva egaleco? Sen tio ili restas nur teoriaĵo, bela slogano, ĥimero, revo, nerealeca idealo. Tial la Esperanto-movado batalas por la fundamenta homa rajto je komuna, neŭtrala internacia lingvo. Tial Esperanto mem estas homa rajto.

S. Milojević



Kongreso en Pakistano



IOM HEZITE, en nia aprila numero ĉi-jare (p.84), ni anoncis la fondiĝon de Pakistana Esperanto-Asocio. Tia novaĵo meritis ja pli da spaco kaj pli elstaran lokon en la revuo. Sed, se el lando, kie tute ne ekzistis Esperanto-movado, venas tia informo, oni havas kaŭzojn por heziti. Nun estas klare, ke en Pakistano okazas vigla Esperanta laboro. Ne nur, ke la Asocio fondiĝis, sed ĝi eĉ kongresis la 27an kaj 28an de aŭgusto ĉi-jare en Jhelum, inter Lahore kaj Rawalpindi. Parolis tie s-roj Abŭl Ghaffar Falak (maldekstre supre en nia fotomozaiko), Muztar Abbasi (maldekstre meze), ŝajne la ĉefaj animantoj de la Movado tie, kaj grava loka eminentulo, s-ro Syed Sajjad Hussain Majeedi (dekstre sube). Ĉeestis ankaŭ pluraj profesoroj, instruistoj, advokatoj. . . Pakistana Esperanto-Asocio membrigis pliajn 30 homojn; okazis ekspozicio de libroj, danke ricevitaj reage al nia aprila informo. La 8an de septembro okazis alia Esperanta renkontiĝo. La pakistana gazetaro favore raportis pri la eventoj kaj aperigis intervjuon kun s-ro Falak. Aperis lernolibro de Esperanto en urduo, pakistana ĉeflingvo; pretas manuskripto de vortaro. La Internacian Lingvon lernas grupoj en la urboj Sargodha, Lahore, Jhelum, Attock, Abbottabad, Parachenar kaj Kotti. Adreso: Informa Centro de Pakistana Esperanto-Asocio, 228 Lower Mall., Murree, Pakistano. Antaŭdankon pro librosendaĵoj! ?

Helpe de sepmejlaĵ botoj


UEA havas moviĝeman prezidanton. Eble ankaŭ vi, kiel cetere li mem, trovas, ke nia revuo ofte mencias liajn entreprenojn kaj plenas je lia nomo. Tamen, ni mem havas alispecajn rimorsojn, ĉar ni sukcesas raporti nur pri duono de liaj elpaŝoj, renkontiĝoj, prelegoj, kunvenoj, akceptoj, partoprenoj en konferencoj, kongresoj ktp. Ni cetere ne sukcesas ĉiam ĝustatempe tralegi liajn leterkopiojn kaj kutime plurpaĝajn detalajn notojn pri ĉiu kunsido, vizito, kontakto. Juĝu mem: nun estas novembro kaj ni finfine sukcesis digesti preskaŭ 20-paĝan, dense tajpitan notaron pri la aŭgusta vojaĝo de la prezidanto. Tiujn 20 paĝojn necesas nun kondensi al paĝo kaj duono ĉi tie. Do, ni provu!

Inter la 7a de julio kaj 28a de aŭgusto ĉi-jare, d-ro Tonkin fakte faris vojaĝon ĉirkaŭ la mondo, do en malpli ol 80 tagoj, kiel dirus la fama romanisto Jules Verne, sed kvazaŭ helpe de sepmejlaĵ botoj el la konata fabelo. Li flugis el Nov-Jorko al Londono, de tie al Roterdamo (kvintaga laboro en la CO), Frankfurto, Bukareŝto (v. pri tio la paĝon 193), Sofio kaj Varno (v. nian septembran numeron), Istanbul, Teherano, Nova Delhio, Tokio kaj de tie reen al Nov-Jorko. Ni provu ĉi tie enfokusigi nur tri haltolokojn: Teherano, Nova Delhio, Tokio.

Teherano: D-ro M.H. Saheb-Zamani organizis la viziton inter la 10a kaj 14a de aŭgusto. Ĝi komenciĝis per gazetara konferenco ĉe *Tehran Journal*, kun partopreno de ties redaktoro T. Hannan (el Srilanko), filipina ĵurnalistino Marilen Estacio, Bradley Davis (Usono), Jean-Marie Lebon (Belgio) kaj Esperanto Kurami, gazetara ataŝeo de la Filipina Ambasadato. Rezulte de la konferenco aperis longa artikolo en *Tehran Journal* kaj eĉ pli longa en *Le Journal de Téhéran*, kiu kelkajn tagojn pli frue aperigis tre ampleksan pozitivan artikolon pri Esperanto de la sama ĵurnalistino. Aparta intervjuo okazis kun Sisi Maleki, ĵurnalistino de la influa *Keyhan International*, kio rezultigis ampleksan pozitivan artikolon en la numero de la 14a de aŭgusto. Ankaŭ pluraj manĝoj de la prezidanto en Teherano estis oficialaj kaj laboraj: La 11an de aŭgusto en la domo de la eldonisto Ahmad Atai, kiu ĝis nun presis la Esperantan lernolibron de d-ro Saheb-Zamani en 14 000 ekzempleroj, vespermanĝon ĉeestis ankaŭ pastro Paul Sato, usonano, gvidanto de la protestanta komunumo en Teherano, kiu lastatempe helpis gajni grandan donacon por la Esperanta eldono de *Islama enciklopedio* (jam kolektigis pli ol 23 000 guldenoj da tiucelaj donacoj). La nova rektoro de la Universitato Faraĥ, prof. Amir-Arĝmand, kiu ĝis antaŭ nelonge profesoris en la Universitato de Teherano kaj siatempe informadis Uneskon pri la Esperanta agado ĉe tiu universitato, okazigis specialan lunĉon por la prezidanto de UEA, la 13an de

aŭgusto. La ĉefa celo de la invito estis preparoli la situacion de Esperanto kaj ĝian eventualan enkondukon en la Universitato Faraĥ (kiu troviĝas ankaŭ en Teherano). Ĉeestis pluraj profesoroj kaj la ĵurnalistoj M. Davami (*Hodiaŭa virino*) kaj d-ro Ŝariat (*Tehran Economist*).

Apartan artikolon meritis plurpaĝa notaro pri la konversacioj inter Saheb-Zamani kaj Tonkin, kio okupis la tutan reston de la disponebla tempo en la irana ĉefurbo. Tiuj interparoloj (al kiuj ni verŝajne baldaŭ revenos en nia revuo) traktis i.a. eldonadon de bazaj sciencaj verkoj, anoncvarbadon por nia revuo, eldonon de *Islama enciklopedio*, porkomencantan suplementon en nia revuo, pretigon de nova pri-Esperanta libro de Saheb-Zamani, *Morgaŭiĝo de hodiaŭ* (kiu estas tradukata en la anglan), represojn de Esperantaj libroj en Irano, eksterajn rilatojn de UEA, agadon en Hinda Unio



Supre, de maldekstre: D-ro U. Lins, UEA-komisiito pri la eldona agado, prof. F. Egami, prezidanto de Japania Esperanto-Instituto, d-ro Tonkin kaj s-ino Y. Isobe, organizinto de la vizito al Japanio. Sube: La prezidanto de UEA prelegas en la nova domo de Japania E-Instituto en Tokio.

kaj Pakistano, agadon en arabaj landoj ktp., ktp. Ankaŭ ĉi tiu vizito konfirmas, ke en Irano daŭre disvolviĝas tre ampleksa kaj novstila agado por Esperanto, pri kio ni jam plurfoje raportis en la revuo.

Nova Delhio: Proksimume 48-hora restado de d-ro Tonkin en la ĉefurbo de Hinda Unio, la 15an kaj 16an de aŭgusto, estis unu el raraj klopodoj en la lastaj jaroj, ke funkciulo de UEA provu surloke orientiĝi kaj informi pri la kompleksa situacio de la jam jardekojn longe vegetanta Esperanto-movado en tiu vasta lando. Diference de Teherano, kie la vizito pasis ĉefe en ekstermovadaj kontaktoj, en Nova Delhio ĝi koncentriĝis al klopodo renkonti kiel eble pli da lokaj aktivuloj kaj serĉi kun ili vojojn por stabiligi kaj organizi la ekzistantan movadan kernon tie. Kunvenon tiucelan, en la hejmo de s-ro Mahant, malnova esperantisto kaj influa funkciulo ĉe la plej granda hinda fervoja entrepreno (kun ducent kvindek mil laborantoj), partoprenis ĉ. 25 personoj, inter kiuj pluraj bonaj regantoj de la lingvo, iamaj lernantoj de s-ino M. Haudebine. Estis tie s-roj Tulsyani, Jyoti, Malhotra, s-ino Prakash kaj s-ro Vyas, kiu venis el Indore, kie li instruas en la universitato kaj gvidas verŝajne la plej viglan Esperanto-grupon en Hinda Unio. En la diskutoj montriĝis, ke la hinda Esperanto-movado suferas de du ĉefaj problemoj — izoliteco kaj manko de financaj rimedoj. Jam estas ellaborita detala programo por klopodi venki la du obstaklojn, kun kiel eble plej forta rolo de UEA mem en tiuj klopodoj. Dum la vizito tamen okazis du intervjuoj: 15-minuta por la Tuthinda Radio kaj alia por la ĵurnalo *Times of India*.

Tokio: La vizito al Japanio daŭris plej longe — de la 17a ĝis la 28a de aŭgusto — kaj havis tute alian karakteron, ol la vizitoj al Irano kaj Hinda Unio. D-ro Tonkin partoprenis la 65an Kongreson de Japanaj Esperantistoj (ĉ. 350 homoj), faris kelkajn prelegojn antaŭ movada kaj neesperantista publiko, estis plurfoje intervjuita, i.a. por *Asahi Shimbun* (kun kelkmilona eldonkvanto) kaj *Hon'yaku no sekai*, monata gazeto pri kaj de tradukado. Multa atento estis dediĉita al la eksteraj rilatoj de UEA kaj tiucele aranĝitaj renkontiĝoj kun i.a. prezidanto de la Nacia Federacio de Unesko-Asocioj en Japanio (verŝajne la plej forta tiaspeca organizaĵo en la mondo), kun ĉefdirektoro de la Japana Fondaĵo (kiu pasintjare publikigis broŝuron pri sia laboro, en Esperanto), kun respondeculoj de la Universitato de Unuiĝintaj Nacioj, estrarano de la organizaĵo Lions International (kiu montras intereson utiligi Esperanton), kun gvidantoj de la Internacia Kristana Universitato en Tokio kaj populariĝanta religia movado Mondo-Mesianismo (ankaŭ ĝi forte interesiĝas pri utiligo de Esperanto: s-ino Isobe regule gvidas E-kursojn tie; la movado eĉ finance subtenis la tutan vojaĝon, kiu ne tuŝis la financajn rimedojn de UEA), . . . Nu, ni finu la longan kunvenliston aldonante, tamen, ke okazis ankoraŭ apartaj kunsidoj kun pluraj movadaj funkciuloj en Japanio kaj vizito al la nova JEI-sidejo. Ĉi tiu vojaĝpriskriba krokizo finiĝu per pensiga rimarko, notita de d-ro Tonkin post unu el la tokiaj konversacioj: "En Eŭropo vi ekinteresiĝas pri agado ĉe la pinto, ĉar vi malsukcesis movi la amasojn; ĉi tie ni movas la amasojn."

sm

FAKAJ MEDIOJ:

Sciencaj studoj en prestiĝa revuo

DU NUMEROJ de la internacie fama faka revuo *Word*, organo de Internacia Lingvistika Asocio (ILA), Novjorko, aperos en 1979 sub la gastredakto de prof. d-ro Richard E. Wood, redaktoro de *Lingvaj problemoj kaj Lingvo-planado*. La unua numero, duoble tiel granda, kiel normala kajero de *Word*, entenos artikolon de Wood mem, sub la titolo "Ne-teritoria, ne-etna lingva komunumo". Temas pri socilingvistika pritakso (kun ampleksa bibliografio) de la fenomeno de la ekzisto de la uzantaro de Esperanto, dise en la mondo.

La aŭtoro dediĉas apartan atenton al kompara analizo de la kialoj de la lernado de Esperanto kaj de fremdaj lingvoj; al la samtempa ekzisto de lernintoj de la lingvo kaj de denaskaj parolantoj, de movadanoj, kiuj nebone aŭ tute ne posedas la lingvon, kaj de personoj, kiuj bone, eĉ denaske, parolas la lingvon, sed ne apartenas al la Movado; kaj al nunaj tendencoj en la evoluo de la socilingvistika komunumo de la uzantoj de Esperanto. La numero portos la ĝeneralan titolon "Socilingvistikaj

studoj pri lingvo-kontakto". Krom la ĉefa gastredaktoro Wood, gastredaktoroj estas ankaŭ profesoroj William F. Mackey (Internacia Centro por Studo de Dulingveco, Universitato Laval, Kanado) kaj Jacob Ornstein (Universitato de Teksaso, El Paso, emerita). Tiu lasta estas multjara simpatianto de Esperanto; liaj popularsciencaj verkoj pri lingvistiko kaj lingvoj kun simpatio aludas Esperanton, kio certasence donas al li la rolon de sek-vanto de la lastatempe forpasinta popularscienca lingvistika verkisto, prof. Mario Pei.

La dua, ankaŭ duobla, numero de *Word* aperos sub la titolo "Lingvo-planado kaj lingvo-traktado: Tutmondaj kaz-studoj". Tiu, same anglalingva, kajero entenos proks. tridek studojn pri la lingvo-planado kaj lingva politiko en tiom da landoj, regionoj aŭ lingvaj teritorioj. Inter ili troviĝas studo de Jouko Lindstedt, studento pri la lingvistiko ĉe la Universitato de Helsinko, Finnlando, "Planado de planlingvo; La konstantaĵoj kaj variaĵoj de Esperanto".

Krom la kutima ekspedo al 3 000 membroj-abonantoj de ILA, la du artikol-kolektoj aperos kiel binditaj libroj, en limigita kvanto (verŝajne po 250 ekzempleroj). Unuopuloj aŭ bibliotekoj povas informiĝi ĉe: International Linguistic Association, s-ino Catherine Davidovitch, 73 Point Beach Drive, Milford, CT 06460, Usono.

Kio nova en Rumanio?

”OKAZE DE LA MALFERMO de pluraj Esperanto-kursoj en Timișoara (en la Universitato, en la Institutoj pri Medicino, Agronomio kaj Politekniko, en la Popola Universitato kaj en la entrepreno Electrotimiș), renkontiĝis la 23an kaj 24an de septembro la Kolektivo Esperanto-Interlingvistiko de Rumanio.” Tion — pri tiuj ses novaj Esperanto-kursoj — skribis al ni fine de oktobro s-ro Wive Reinhardt, studento pri matematiko ĉe la Universitato de Timișoara. Al niaj legantoj ni, tamen, ŝuldas multe pli da informoj pri la lastatempaj movadaj okazintaĵoj en Rumanio, aluditaj en niaj numeroj de junio (p. 126) kaj julio/aŭgusto (p. 129), same kiel en nia septembra numero (p. 154).

Post proksimume unujara preparlaboro, la 29an de majo 1978, en la Universitato de Timișoara, okazis fondkunveno de nova Esperanta organizaĵo en Ruma-



”FERIOJ en Rumanio” nomiĝas la speciala Esperanta eldono de la revuo de la Turisma Ministerio de Rumanio. Tiu luksa 24-paĝa presajo estas la unua oficiala rumana Esperanta eldonaĵo dum la lastaj jardekoj. Ĝi aperis en julio 1978.

nio — Kolektivo Esperanto-Interlingvistiko; tio estas ĝia oficiala nomo. La Kolektivo — ni nomu ĝin tiel mallongigite en ĉi tiu teksto — estas oficiala movada instanco kaj ĝi anstataŭas la antaŭan Rumanan Kunordigan Esperanto-Komitaton, kiu fakte neniam estis oficiale agnoskita kaj leĝe registrita. Ne estas tute klare, ĉu nun la Kolektivo estas aŭ estos leĝe registrita, sed pri ĝia oficialeco ne ekzistas duboj: ĝi estas parto, kvazaŭ specialigita fako, de la Rumana Akademio de Sociaj kaj Politikaj Sciencoj, ĝia fondkunveno okazis sub la egido de la Scienca Konsilantaro de la Centro de Sociaj Sciencoj en Timișoara, kies direktoro, prof. d-ro Ilie Luca, kiu estas ankaŭ la vicrektoro de la Universitato, parolis en la kunveno, kie estis ankaŭ prof. Vasile Șerban, dekanio de la Filologia Fakultato. Prof. d-ro Ignat F. Bociort fariĝis prezidanto de la Kolektivo (ni nun ekscias, ke li fakte estis prezidanto ankaŭ de la

Kunordiga Komitato dum la lasta jaro); vicprezidantoj estas prof. d-ro Aurel Boia kaj univ. docento Cezar Apreotesei; sekretario fariĝis univ. asistanto Constantin Dominte. La adreso de la nova organizaĵo estas:

Kolektivo Esperanto-Interlingvistiko, Bulevardul Parvan nr. 4, R-1900 Timișoara, Rumanio.

Verŝajne estas frue jam nun diskuti, ĉu la Kolektivo havas trajtojn de landa asocio. Kvankam ĝia nomo ne sugestas tion unuavide, la Kolektivo plenumas kelkajn taskojn de la kutima landa Esperanto-organizaĵo, ĉar ĝi, ekzemple, havas ankaŭ apartan organizan fakon, apud la tri aliaj sekcioj: scienc-metodika, dokumentada, traduka. Aliflanke, imponas la akcento, kiun en siaj unuaj elpaŝoj la Kolektivo metas je la scienco kaj universitatnivela instruado de Esperanto. La telegramo, kiun ni aperigis en nia junia numero, efektive montriĝas esti ĝusta kaj gravega novaĵo: Jes, en Rumanio ekzistas ebleco, oficiala, studi Esperanton ĉe ĉiuj filologiaj fakultatoj de la lando, kvankam oni, nun en la komenca periodo, spertas la problemon trovi sufiĉe da taŭgaj instruantoj. Sed ankaŭ tio solviĝos, ĉar estas minimume 12 studentoj, kiuj nun por sia diploma laboro esploras Esperantajn temojn. Krome, la Internacia Lingvo estas tezo de du doktoriĝaj disertacioj. La Kolektivo havas konkretajn planojn aperigi lernolibrojn, vortarojn kaj studojn pri diversaj aspektoj de la Internacia Lingvo. En la menciita renkontiĝo de la Kolektivo en Timișoara, fine de septembro, du sciencaj rondoj jam ekfunkciis kaj diskutis komunikaĵojn de siaj membroj. Samtempe, en la Universitato de Timișoara okazis la ekspozicio ”Esperanto — ideo en agado.” Grava evento en la disvolviĝo de la Esperanta agado en Rumanio lastatempe estas la vizito, kiun inter la 13a kaj 17a de julio ĉi-jare faris al Bukareŝto d-ro Humphrey Tonkin. Dum sia restado en la rumana ĉefurbo, la prezidanto de UEA kaj funkciuloj de la nova movada organizaĵo en Rumanio faris plurajn gravajn kontaktojn kaj utilajn vizitojn. En apartaj kunvenoj ili renkontiĝis kun: prof. Ion Dragan, vicprezidanto de la Rumana Unesko-Komisiono, s-ro Petre Constantin, vicministro en la Ministerio pri Supera Edukado, s-ro Audun Øfjord kaj s-ro Dragoș Vaida, direktoro kaj vicedirektoro de la Eŭropa Centro por Supera Edukado. La plej grava renkontiĝo estis tiu kun prof. Mihnea Gheorghiu, prezidanto de la Akademio de Sociaj kaj Politikaj Sciencoj, do tiu scienca institucio en kies kadro nun funkcias la Kolektivo Esperanto-Interlingvistiko. La renkontiĝon partoprenis ankaŭ prof. Zoe Dumitrescu-Bușulenga, vicprezidanto de la Akademio.

La ĝenerala impresoj pri la lastatempa disvolviĝo de la Esperanto-movado en Rumanio estas pozitiva. Eble ĝia ĉefa trajto estas ligiĝo al la sciencaj rondoj kaj reakiro de prestiĝo tie, kie ĝi dum kelkaj lastaj jardekoj estis duba ĝuste en Rumanio. Plua evoluo de la rumana Movado grandparte dependas de la kapabloj de la esperantistoj mem eluzi la pene plifavorigitan situacion. Tiel cetere estas ankaŭ en preskaŭ ĉiuj aliaj landoj — plimulto dependas de esperantistoj mem, eĉ se ili malofte konscias aŭ pretas konfesi tion.

sm

Tamen kritike pri sukceso

DE LA 7a ĝis la 10a de oktobro 1978 disvolviĝis en Zagrebo (Jugoslavio) la dua parto de la ĉi-jara 11a Pupteatra Internacia Festivalo (PIF). Kiel konate, la unua parto okazis en junio en la nordnorvega urbo Tromsø. Ni rememorigu, ke en la dek antaŭaj PIF-oj partoprenis kune 53 profesiaj pupteatroj el 15 landoj kaj montris 82 scenverkojn al 113 000 spektantoj en 406 prezentaĵoj. Necesas aldoni, ke 9 el la spektakloj estis registritaj kaj poste elsenditaj pere de la televido. Vere, do, la honortabulo de PIF estas pli ol impona.

Ĉi-foje, la sensacio de la programo senkonteste estis la partopreno de la Pekina Pupteatro, atendita kun egala scivolo kaj pro ĝiaj specifaj kulturartaj trajtoj kaj pro la esperantlingveco de ĝia programo. La fakto ke *La ribelo kontraŭ la ĉiela palaco* gajnis la unuan premion de la faka ĵurio kaj la unuan premion de la infana ĵurio estas la plej bonaj pruvoj, ke la partopreno de la ĉinoj estis eminenta kaj ke ĝi multe kontribuis al la sukceso de la 11a PIF kiel tuto.

Certe ne eblus nei, ke PIF ankaŭ ĉi-foje estis sukceso. Sed..., ĉar mi konsideras ĝin kiel esperantisto, mi devas konfesi, ke mi rimarkis ankaŭ kelkajn malagrablajn mankojn. Mi konas multajn el la problemoj de la organizantoj kaj mi scias pri la senĉesaj eksteraj premioj de la blinkenbergaj* medioj. Tamen, kun korpremo mi konstatis, ke el la 9 diversaj spektakloj de la Festivalo (8 en la oficiala konkurso) nur 4 estis en Esperanto. Efektive, neniuj el la 5 jugoslavaj pupteatroj prezentigis en la Internacia Lingvo. Mi ne povis ne mencii tiun riproĉon al la direktoro de Internacia Kultura Servo (IKS), organizanto de la Festivalo, s-ro Zlatko Tišljarić, kiu asertis, ke jam la 12a PIF estos senkompromisa rilate la uzon de Esperanto kaj, ke en ĝi ankaŭ la jugoslavaj partoprenantoj devos prezenti siajn konkursajn spektaklojn en la Internacia Lingvo.

La tro amasa partopreno de jugoslavaj pupteatroj dro-nigis la pli fruan amikan internacian etoson de PIF-oj, kaj la eksterlandaj partoprenintoj ne sentis sin speciale kuraĝigitaj uzi sian modestan scion de la Internacia Lingvo. Atendi ke la ĉinaj aktoroj, post nur trimonata lernado, provu paroli Esperanton ekster la scenejo, certe ne estus realisme. Des pli do sentiĝis la preskaŭ absoluta manko de neslavaj partoprenantoj (kial mankis ĉi-jare Rumanio?), kun kiuj la slavo ofte devus kiom-tiom balbute uzi la vorttrezoron de siaj prezentaĵoj por amika koridora interkompreniĝo. Por mi tio ĉiam estis unu el la plej grandaj ĉarmoj de PIF.

Tria grava manko, kiu nur etparte dependas de la organizantoj, estas la daŭre nesufiĉa intereso, kiun mon-

tras la esperantista publiko pri PIF. Ĉi-foje ne okazis eĉ la tradicia internacia infanrenkontiĝo. Ĉu pro tio, ke la zagreba sekcio de PIF nomiĝis "Pupoj ne estas nur por infanoj"? (Mi konstatis, ke ĉiuj esperantlingvaj prezentaĵoj ja estis ankaŭ por infanoj.) Mi devas daŭre miri, ke la ceteraj vojaĝemaj esperantistoj, ĉiam pretaj partopreni almenaŭ kelkdekope la plej sensignifan internacian renkontiĝon, ne opinias inda pasigi kelkajn tagojn en Zagrebo por rigardi manplendon da spektakloj en la Internacia Lingvo. Ĉu ili ankoraŭ ne komprenas, ke la pupteatro en sia nuna evolua fazo ne estas "infanaĵo"? Tiel, dum la renomo de PIF en la fakaj medioj ne plu estas pridubata, inter la esperantistoj ĝi ankoraŭ troe restas "io pri kio mi ŝajne ie legis". Cento da zagrebaj esperantistaj rigardantoj, inter kiuj duono estis infanoj, estas iom malforta pravigo por tiel ampleksa Esperanta manifestacio, kiel la nuna PIF, kiun rigardis en Zagrebo ĉirkaŭ 5 000 personoj, dum ĝiajn prezentaĵojn en aliaj urboj spektis pliaj 10 000 homoj.

Krom la ĉefpremio, gajnita de la ĉinoj, estis atribuita ankaŭ la premio de la jugoslava sekcio de UNIMA (Internacia organizaĵo de pupistoj), kiun egalrange dividis la pupensembloj el Wroclaw (Pollando) kaj Ljubljana (Jugoslavio) kaj diversaj individuaj premioj al reĝisoroj, scenografoj, aktoroj ktp.



"La ribelo kontraŭ la ĉiela palaco": Triumfo en la 11a PIF.

Ankaŭ la esperantista ĵurio aljuĝis diversajn rekonojn: La premio "Tibor Sekelj" por la prezentaĵo kun la plej homama mesaĝo iris al la Pupteatro de Pleven (Bulgario), dum la du grupaj premioj por la plej bona sceneja apliko de Esperanto iris al la Hungara Ŝtata Pupteatro el Budapeŝto kaj la Pupteatro el Wroclaw (Pollando). La premion "Jozefo Petrin" — por unuopa pupisto, kiu plej bone uzas Esperanton ekster la scenejo — gajnis Roberto Banky el Budapeŝto. Pro la sceneja uzo de la Internacia Lingvo la unua premio estis atribuita al la polaj aktoroj Jozef Frejment kaj Jan Fornal, la dua al Antoaneta Andreeva el Pleven, kaj la tria al la dudektri-jara ĉina aktoro An Ziming.

Roger Imbert

* Laŭ dana prof. Blinkenberg, ĉefa kontraŭulo de Esperanto en la 8a Ĝenerala Konferenco de Unesko, Montevideo 1954.

Eŭropa integriĝo kaj lingva justeco

Ĉi tie aperas proksimume duono de la studo, kiun prof. d-ro Ilmar Tammelo publikigis en la libro "Europa – Weltmacht oder Kolonie?" (Eŭropo – mondpotenco aŭ kolonio?), redaktita de K. Kaltenbrunner, eldonita ĉi-jare en la kolekto "Herderbücherei, Initiative 25", en Munkeno. D-ro Tammelo (61) nun estras la Instituton de Jurfilozofio en la Universitato de Salzburg (Aŭstrio) kaj estas vaste konata fakulo, profesorinta i.a. en la universitatoj de Sydney, Harvard, Oxford, Columbia (Nov-Jorko), Bruselo, Munkeno kaj Tokio. Kvan-kam la ĉi tie aperanta studoparto tuŝas iujn en la Movado "tabuajn" temojn – la ellasita tekstoparto faras tion eĉ pli okulfrappe (ekzemple, ĝi enhavas proponojn por "plibonigi" Esperanton) –, ni opiniis, ke estas utile prezenti al la legantaro de nia revuo la manieron en kiu oni ekster la Movado argumentas favore al Esperanto.

LA STREBOJ unuigi plurajn ŝtatojn politike kaj ekonomie povas havi daŭrajn rezultojn nur, se la nova ordo konformas al la postuloj de justeco. Oni provis solvi esencajn problemojn de la unuiĝo de Eŭropo en tiu senco. Strange, ke unu problemo, kies solvo gravas fundamente por sukceso en politika kaj ekonomia kunlaborado, ankoraŭ estas apenaŭ frontita de kompetentaj instancoj aŭ de la publika opinio. Tiu problemo, kvazaŭ forpremita el la konscio de la respondeculoj, estas tiu de interkomunika lingvo, kiu sufiĉe taŭgu por la Eŭropa Komunumo. La malzorgo solvi ĝin efikas fatale en la ekonomio kaj malhelpas la progreson en la politika kaj jura sferoj.

Evidente ne ĉiuj lingvoj de la membroj de la Eŭropa Komunumo povas esti uzataj kiel interkomunikaj lingvoj. Konsidereblas nur unu sola aŭ, maksimume, tri el ili. Sed ankaŭ tio estas tre dubinda, ĉar neniuj nacia lingvo havas tiajn preferindajn altkvalitojn, kiuj sufiĉe motivus ĝian elekton je kosto de la aliaj. Ili ĉiuj estas arkaikiĝintaj kaj montras konsiderindajn difektojn, inter kiuj gravas precipe iliaj gramatikaj kaj fonetikaj neregulecoj, ankaŭ la tre limigitaj ekkonebleco kaj imitebleco de ilia vortformado. El la justeca vidpunkto maltrankviligas aparte, ke tiuj, kies gepatra lingvo estus la elektota, ĝuus gravan avantaĝon, dum la aliaj suferus tre senteban malavantaĝon. Kaj vere, elekti nacian lingvon interkomunika lingvo, kondukas al la lingva hegemonio, kiu pli-malpli baldaŭ estos sentata kiel maljusta – kaj tial ĉagrena – sperto, jam nun observebla en ŝtatoj kun lingvaj minoritatoj.

Ŝajnas, ke racia solvo de la interkomuniklingva problemo por la Eŭropa Komunumo estus tiucela decido por "artefarita", tiel nomata "planlingvo". El la lingvoj tiel estiĝintaj, almenaŭ kvin montriĝas hodiaŭ jam sufiĉe maturaj; kelkaj estas ankaŭ elprovitaj dum pluraj jardekoj; ili pruvigis taŭgaj por sciencaj same kiel por praktikaj taskoj. En rilatoj esencaj por interkomunika lingvo ili eĉ superas iun ajn nacian lingvon.

Kiaj kaŭzoj, do baris la planlingvan vojon al internacia lingvo de interkomunikado? Ili estas multoblaj kaj multspecaj; ilia komuna denominatoro estas nescio, antaŭjuĝo kaj perfektismaj postuloj.

La nescio rilatas ĉefe al la estiĝmaniero, entute, de lingvoj. Ĉar ekzistas opinio, laŭ kiu "aŭtentika" lingvo povas estiĝi nur "nature", sed ne povas esti "konstruita". Tiu opinio ne ĝustas pro tio, ke al la plej multaj planlingvoj ne mankas la natureco (ili baziĝas plej ofte sur vortradikoj kaj aliaj lingvaj elementoj transprenitaj el naciaj lingvoj) kaj, ke ankaŭ la naciaj lingvoj estas konscie formitaj (kun precipa intenso tiaj lingvoj, kiajn oni en mallonga tempo evoluigis ĝis nivelo konforma al hodiaŭaj postuloj – kiel ekzemple la novhebrea kaj la estona).

Antaŭjuĝo, malakcelanta la sukceson de la planlingvoj, kuŝas en la opinio, ke internacia planlingvo devus detrui la naciajn lingvojn. Tia starpunkto povas pravi nur en tio, ke komplete adekvata planlingvo superfluigus fine la naciajn lingvojn en ties rolo de **internacie** komunika lingvo, sed ne en tio, ke ĝi forpremus tiujn lingvojn el ilia rolo kiel naciaj lingvoj. Plia antaŭjuĝo kuŝas en la opinio, ke planlingvo baras la aliron al la kulturaj valoroj, kiujn la naciaj lingvoj portas. Tiu opinio malpravas jam pro tio, ke planlingvo, en la menciita funkcio, tute ne ekskluzivas la lernadon de naciaj lingvoj, sed – kontraŭe – ĝin akcelas. Ĝi povas faciligi la lernadon, ĉar la antaŭe akirita kono de racia, modela lingvo (kaj ĉiu bona planlingvo estas tia) konsiderinde efikas – kiel pedagogiaj eksperimentoj pravis – la ellernadon de kiu ajn alia lingvo.

Perfektisma postulo koncernanta la planlingvojn en la rolo de internacie komunika lingvo konsistas en tio, ke tia lingvo superu la naciajn lingvojn **en ĉiu rilato**. Sed tio estas neebla, ĉar nenia lingvo povas ekzakte respeguli ekzemple la vortludojn de alia lingvo. La historia dimensio de lingvo, ĝiaj dialektoj, ĝiaj slangoj, kaj simile, restas por ĉiu lingvo ties specifaĵo. Sed ĉi tiuj aspektoj estas por la internacia perlingva interkomunikado tute flankaj. Kiu trovas ilin gravaj, tiu ja povas lerni, sen ia ĝeno, la koncernan nacian lingvon. Plia perfektisma postulo kuŝas en tio, ke oni opinias, ke tia lingvo devas esti **samtempe** facile lernebla, facile elparolebla, ĉiam senambigua, belsona, esprimriĉa, neŭtrala kaj homogena. Sed tiuj postuloj estas parte interkontraŭdiraj parte neplenumeblaj. Ekzemple, la vorto de lingvo, kiu estas tre esprimriĉa kaj en kiu troviĝas neniuj plursencaĵoj, ne povas esti – ĉiuj – facile elparoleblaj, belsonaj, kaj facillerneblaj. Lingvo, kiu estas plene neŭtrala, ne povas esti kaj homogena kaj facillernebla, ĉar ĝi devas ĉerpi elementojn el ĉiuj koncernaj lingvoj laŭ egala

proporcio, kio detruas ĝian homogenecon kaj simplecon de ĝiaj vortradikoj, konsiderante ke la naciaj lingvoj estas treege diversaj kaj kelkaj el ili havas komplikajn vortojn.

Ĉe la priparolitaj perfektismaj postuloj estas ankaŭ pripensende, ke tio, kio estas facile lernebla, facile elparolebla kaj belsona por la membroj de difinita lingvanaro, ne ĉiam impresas kiel tia ankaŭ la anaron de alia lingvo. Plie estas konate, ke tio, kio tuŝas iun homon en iu lingvo (aŭ eĉ en iu parolmaniero) kiel tute natura, povas tuŝi alian homon eĉ kiel ridinda. El ĉio ĉi konkludiĝas, ke estas neeble plenumi la perfektismajn postulojn, kiuj rilatas al planlingvoj. Kio povas esti postulata de planlingvo, kiu taŭgu kiel internacie komunika lingvo, estas, ke ĝi estu racia kompromiso inter la postuloj pri laŭeble facila elparolebleco, laŭeble homogeneco, kaj laŭeble vasta neŭtraleco. Ĝi estu libera de nenecesaj plursencaĵoj, ebligu ĉiujn bezonatajn esprimojn kaj ne ofendu la estetikan senton. Al tiuj postuloj la plej multaj maturaj planlingvoj vere konformas.

Laŭ mia ebleco tion prijuĝi, apartenas al tiu nombro Esperanto, Ido, Novial, Occidental kaj Interlingua. La vorttrezoro de ĉiuj el ili baziĝas sur hindeŭropaj lingvoj; ili konsistas ĉefe el internaciaj vortoj, kiuj estas komunaj al ĉiuj eŭropaj kulturlingvoj kaj kiuj laŭ ordinara mezurilo estas ĉiuj belsonaj. La plej larĝan bazon de vorttrezoro havas Esperanto, kiu transprenis — krom la vortelementoj de latina origino — tiajn elementojn ankaŭ el ĝermanaj kaj slavaj lingvoj. La plej simplan prononcon havas Novial. La plej grandajn eblojn de vortfarado prezentas Ido. La plej grandan homogenecon havas Interlingua, kies modelo estas sudromidaj lingvoj. Por la plej multaj eŭropanoj Occidental kaj Interlingua estas, sen aparta studo, plej bone kompreneblaj (kvankam ĝis parolkapablo ne vere rapide ellerneblaj), nome surbaze de scio de la itala, hispana, portugala, franca aŭ angla lingvo. Iliaj gramatiko kaj sintakso (kiel tiuj de ĉiuj supre menciitaj planlingvoj) estas tiel simplaj, ke iugrade klera homo bezonas nur malmultajn horojn por konatigi al si la strukturon de la koncerna lingvo. Sur la plej ampleksa praktiko apogiĝas Esperanto, kiu ekzistas jam de proksimume 90 jaroj kaj disponas pri sufiĉe granda, multflanka literaturo; ĝi estas efektive parolata de multaj homoj kaj jam pro tio konsiderenda "vivanta" lingvo, kiel la modernaj naciaj lingvoj. Al la precipaj avantaĝoj de Esperanto apartenas ĝia fleksebla frazkonstruo, ĝiaj bone difinitaj derivpartikloj, uzataj por formi bone kompreneblajn vortojn, kaj la postulenda kurteco de ĝiaj vortoj.

Post ekzameno de ĉio koncerna montriĝas kredeble, ke preferindas tamen Esperanto. Sed tio ne signifas, ke Esperanto ne povas esti pli bona ol ĝi estas hodiaŭ, kun la evoluo spertita dum sia historio. Sur ĝian evoluon efikis malakcele la opinio, ke ĝisfunda renovigo de tiu lingvo estos permesebla nur post ĝia oficiala agnosko kiel mondlingvo. Tio sendube kontribuis al la stabileco de la lingvo kaj ebligis, ene de malmultaj jardekoj, plurmilvoluman, ne en dialektojn splititan, literaturon, sed

liveris, aliflanke, kroman kaŭzon, kial Esperanto tiun staton ne atingis.

El pluraj argumentoj por kontraŭi la agnoskon de Esperanto kiel planlingva komunikilo por la Eŭropa Komunumo, jenaj estu menciitaj: Oni povas diri, ke multa laboro necesas por traduki en Esperanton la koncernajn jurajn kaj aliajn esencajn tekstojn. Oni ankaŭ povas uzi kiel kontraŭargumenton la fakton, ke ĉiun lingvon necesas lerni; la simpleco de iu ajn lingvo estas nur relativa. Oni ne povas postuli, ke la nuntempaj aŭtoritatuloj de la Eŭropa Komunumo, en sia matura aĝo kaj ĉe sia troŝarĝiteco per laboro, lernu, krome, Esperanton. Tiun obstaklon oni povas superi ne insistante, ke Esperanto (aŭ alia planlingvo) estu tuj akceptita kiel unusola interkomunika lingvo de la Eŭropa Komunumo, sed por konvena tempo de transiro kiel unu el la interkomunikaj lingvoj, apud la jam uzataj naciaj lingvoj. Cetere, por ĉiu vera progreso bezoniĝas pacienco, klopodado kaj iuj oferoj. Estas por mi neimageble, ke la argumentoj kontraŭ la proponata maniero solvi la problemon de eŭropa interkomunika lingvo povas esti pli decidaj, ol la argumentoj por tia solvo. La kontraŭaj argumentoj sufiĉas eble nur por tio, ke ni komprenu la inerton, obstinon kaj apation, kiuj superregas en ĉi tiu afero.

Por mi decida argumento venas el la konsideroj de la justeco. Nur altgrade neŭtrala lingvo, kia estas Esperan-

Kvardekmiliona kaoso

RAPORTANTE pri la ĵus komenciĝinta intertraktado de la Eŭropa Ekonomia Komunumo (EEK) kaj Portugalio, pri ties membreco en la Komunumo, atentigante, ke samcela traktado kun Greklando daŭras jam du jarojn kaj, ke en decembro komenciĝos la traktado kun Hispanio, *Newsweek*, mondvasse konata anglalingva magazino, en sia numero de la 23a de oktobro ĉi-jare, jene komentas la lingvan demandon en la Komunumo:

"La problemoj komenciĝus per simpla komunikado. Nuntempe estas ses oficialaj EEK-lingvoj* kaj la Komunumo elspezas ĉirkaŭ 19 milionojn da dolaroj ĉiujare por samtempa interpretado en siaj kunvenoj. Je aldono de la hispana, greka kaj portugala, la sumo por interpretado proksimiĝus al 40 milionoj — nur por la parola komunikado. Dekoj da aldonaj tradukistoj necesus por la senfina fluo de dokumentoj produktataj de la komunumaj instancoj ĉiujare. Limigo de la nombro de oficialaj lingvoj al du aŭ tri, kiel faras aliaj internaciaj organizaĵoj, preskaŭ certe ofendus naciajn sentojn. Plimulto de observantoj antaŭvidas pli ol etan politikan reziston kontraŭ tiu ideo."

* La angla, franca, germana, itala, nederlanda kaj dana. Irlando diplomate sindetenis insisti pri la gaela por io ajn krom por tradukoj de la EEK-leĝaro.

to, povas eviti la maljustecon de la lingva hegemonio de unu aŭ pluraj naciaj lingvoj. Nur lingvo unusola kaj ĝisfunde racia povas elbari la malŝparadon, nepravigeblan el la vidpunkto de la justeco, de ekonomiaj rimedoj en formo de giganteca elspezado por tradukoj. Rimarkindas, ke la hodiaŭ multe praktikata samtempa interpretado estas speciale multekosta, jam pro la malfacileco akiri la multpretende por tio postulatajn kapablojn. Krom tio, la ŝanco servi al si interpretistojn malfermiĝas al relative nur malmultaj homoj. Cetere tiu tradukado ofte necesigas, ke la tradukisto disponu ne nur pri lingvaj scioj, sed ankaŭ pri fakscioj, kiujn oni ne rajtas de li postuli; tial okazas, en sciencaj renkontiĝoj, ke la traduko misfunkcias.


Restas la konsidero, ĉu eventuala agnosko de Esperanto kiel la sola — aŭ unu el pluraj — eŭropa interkomunika lingvo, estus justa fronte al la aliaj maturigitaj planlingvoj. Pri tio rimarkendas antaŭ ĉio, ke tiu afero tute ne tiel gravas, kiel la devo levi neŭtralan lingvon al la rango de eŭropa interkomunika lingvo. Ĉar en ĉi tiu

kazo temas pri la egaleco de ŝancoj por homoj kun mal-samaj gepatraj lingvoj — sed en la alia kazo nur pri justa aprezo de tio, kion la diversaj kreintoj kaj akcelantoj de planlingvoj merite atingis. El tiu vidpunkto la pretendo de Esperanto estas la plej forta, ĉar en ties elformado, evoluigo kaj disvastigo estas investita la plej multa laboro; plie, la akcelantoj de Esperanto plej multe meritis, klerigante la publikan opinion kaj tiun de la kompetentaj instancoj. Aldoniĝas, ke la enkonduko de Esperanto kiel internacia komunika lingvo postulas la malplej grandan elspezon por taŭgaj vortaroj kaj lernolibroj, ĉar tiaj verkaĵoj jam ekzistas en nombro sufiĉe konsiderinda. Fojfoje montriĝanta arogo ĉe favorantoj de Esperanto kontraŭ aliaj planlingvoj estas same bedaŭrinda kiel arogo en la inversa direkto. La ekzisto de aliaj planlingvoj signifas por Esperanto la vidalvidecon kun kritikmodeloj, kiu povas akceli ĝian pluan evoluon aŭ evitigi erarvojojn de tiu evoluo.

Ilmar Tammelo

Universitato de Salzburg

REAGOO:



Wüster kaj Drezen

EN SIA ARTIKOLO "La alia flanko de la medalo" (*Esperanto*, n-ro 867/3) d-ro Rob Vetter levas kelkajn neresponditajn demandojn pri la lingva deflankiĝo de prof. E. Wüster. Konsiderante la plenan kuntekston de la laboro de la esperantistoj en la sino de la plej altaj normigaj instancoj, de 1934 ĝis 1936, ni pli bone povos analizi la respondon al tiuj demandoj.

En majo 1934 ISA (internacia ligo de la naciaj normigaj komitatoj) dissendis cirkuleron al landaj normigaj komitatoj (ÖNA por la aŭstra, AFNOR por la franca, DINORM por la germana k.a.) pri internacia teknikscienca kodo, skriba kaj sona, sekve de propono de la Tutsovetunia Normig-Komitato kaj Akademio de Sciencoj.

Pere de ÖNA E. Wüster ricevis kopion de la koncerna cirkulero kaj sin turnis al Rollet de L' Isle, prezidanto de ISAE kaj de la Akademio de Esperanto, kiu mem

sin turnis al generalo Bastien, akademiano kaj direktoro de la sekcio por la teknika vortaro.

La bonŝanco volis, ke la ĝenerala direktoro de AFNOR estis generalo Girardeau, sampromocia amiko de generalo Bastien, kaj sekve AFNOR tuj aprobis la demandon de ISA kaj de la soveta komitato, inter kies membroj estis E. Drezen.

De tiam establiĝis rilatoj inter Wüster, Drezen, Bastien (ankaŭ prezidanto de UEA ekde aŭgusto 1934) kaj UEA.

ISA antaŭvidis pridiskuti la problemon pri ellaborado kaj akcepto de internacia skriba kaj parola kodo por tekniko en la kadro de internacia konferenco de diverslandaj normig-komitatoj, en Stokholmo, de la 8a ĝis la 15a de septembro 1934.

Dank' al la kolektitaj apogoj, la ISA-konferenco akceptis la proponon de la sovetunia normig-komitato kaj komisiis ĝin daŭrigi esploron de la problemo intertrakte kun alinaciaj komitatoj.

Tiu favora decido aparte fortigis la poziciojn de E. Drezen, iniciatinto de la propono en Sovetunio. Proponante sian planon al Wüster, UEA (R. Kreuz, direktoro) kaj Bastien, E. Drezen jene skribis (1934 10 08):*


"... Sed necesas ne nur propagandi la ideon; necesas doni ankaŭ konkretan projekton pri ellaboro de la Kodo. Tio estas plej tikla demando. Proponi tuj de komenco 100% esperanton — signifus tuj de l' komenco mem senluziigi la sinjorojn-normigistojn, kiuj dume supozas, ke la Kodon kreos ili.

Laŭ komisiio de la Sovetunia Akademio mi preparis novan raporton kun aldonita skemo de la Kodo. Ĝi ne estas simpla kopio de esperanto, do ĝi ne estas 'plen-

* Leteroj kies partoj estas cititaj en ĉi tiu kontribuaĵo troviĝas en la kolekto de korespondaĵoj de generalo Bastien, ĉe s-ro Amouroux. La cititaj tekstoj, kompreneble, aperas sen redakciaj intervenoj, eĉ en la kazoj kiam tio ŝajnis necesa.

valora lingvo'. Ĝi devas ebligi tradukon de titoloj, de nomenklaturetoj, ne de frazoj diversnuecaj.

Mi persone opinias, ke kiel 'plenvalora lingvo' povas esti aplikata nur esperanto. Tial necesas batali por ricevi motivitan rekomendon aŭ konsenton, ke esp.-uzo estu ellasata ĉiam, kiam necesas iu plivasta esprimo de ideoj por kies esprimo la Kodo ne sufiĉas. Tia rezulto jam signifus gravan venkon. Sed la sciencistoj kaj normigistoj tamen ne ricevu la ideon, ke esperanto senrezerve kaj senkritiko fariĝu la deviga internacia lingvonormo. Esperanto estu kvazaŭ provizora fakultativa rimedo, ĝis kiam la Kodo ne elkreskos en plenan lingvon aŭ, pliverdire, ĝis kiam la Kodo kaj Esperanto ne plene kunfandiĝos. Do necesas speciale atente noti, ke krom la oficialaj kodaj elementoj (prenitaj aŭ ne prenitaj de Esp.) ekzistas nombro da neoficialaj elementoj (nepre el esperanto) kvazaŭ uzeblaj, sed dume ne oficialigitaj.



En la dua raporto preparita por la Tutunia Akademio, mi provis prezenti tiujn elementojn kiuj nepre necesas por skriba kaj parola Kodo. Estas tre malmultaj ŝanĝoj kompare kun la oficiala esperanto sed relative konsiderindaj estas elementoj de esperanto forestantaj (dume) en projekto de la Kodo.

Tiel, ekzemple, en projekto forestas literoj ĥ, ŭ; el gramatikaj finaĵoj restis o (nedevisa), a, i, j (nedevisa por adjektivo), n (nedevisa), ant, int, at, it, por derivadi de terminoj el kunmetitaj vortoj (speciale por teknikaj, ne por bionologiaj sciencoj), restis proksimume 900 radikoj de Fundamenta Vortaro, el kiuj 2-5% estas ŝanĝitaj kompare kun la oficiala esperanto; novaĵoj koncernas ĉefe la serion de scienca afiksaro. Dume mi povas sendi nur al s-ro Wüster ekzempleron de tiu skizo — kun peto, ke li faru siajn rimarkojn kaj resendu ĝin al mi. La komentojn (50 paĝoj) kaj motivigon por tiu skizo mi dume ne sendas, ĉar — ruslingva. Entute tiu projekto estas nun pluen prilaborata, interalie de prof. Ĵirkov, L.K. Post 1-2 monatoj ĝi estos prezentata al la Akademio. Mi povus samtempe organizi ĝian tradukon en 3 ĉefajn eŭropajn lingvojn por diskutcele

dissendi tiujn tradukojn al la naciaj normig-komitatoj. Ĉefa celo de tiu dissendo estas pruvi, ke: 1) ni ne proponas simplan akcepton de Esperanto, 2) solvi la problemon pri strukturo de la Kodo estas tre facile kaj 3) akiri internacian sciencan bazitan interkonsenton pri la formo de konsiderinda kvanto de kodo-elementoj estas ne eble; sola eliro konsistas en starigo de iuj certgrade arbitraj konvenciaj normoj, do tiakaze formoj de esperanto estas tute bone akcepteblaj."

R. Kreuz, terurigita pro la lingva elvojiĝo de Drezen, sin turnis al Wüster, kun kopio al Bastien. Li ne dubas pri la honesta intenco de Drezen sed atentigas pri lia reformemo kvankam li kutimas skribi laŭ fundamenta Esperanto kaj rememoras lian sintenadon dum la tempo de la aktiveco de la idistoj precipe en Sovet-unio. Li krome notas, ke la elementoj de Esperanto forestantaj el la projekto de la kodo jam estis diskuttemo de la idistoj! Sekve, Kreuz petas ne sekvi la lingvan vojon de Drezen.

Per longa letero (1934 10 26) Wüster respondis al Drezen kaj pri liaj devioj for de Esperanto li skribis jenon: ". Vi eldiras la principon, ke la normigistoj havu la eblecon, mem fari krea laboron ĉe la Kodo. Pri tio mi plene kaj forte konsentas, ne pro nura taktiko, sed ĉar efektive nur la normigistoj mem estas kompetentaj pri la teknikistaj eroj de la Kodo.

Sed aliflanke mi ne pensas, ke la normigistoj vidos sian krea laboron en tio, ke ili modifos kelkajn komunlingvajn esperantajn radikojn duobligante ekzemple la radikon 'kaj' per 'ed' aŭ 'baldaŭ' per 'bald'. Kontraŭe en diskutoj mi ĉiam rimarkis, ke inter la ne-esperantistoj preskaŭ solaj la normigistoj havas plenan komprenon por tio, ke al bagatelaj variigoj oni ne devas oferi la unuecon.

Per ŝanĝoj (aŭ paraleligoj) de la speco 'ed' ni, krome, kaŭzus konfuzon kaj kontraŭecon inter la esperantistoj; tio endanĝerigus eble ne nur la Kodon, sed eĉ Esperanton."

Jen do klara respondo konforma al la unua flanko de la medalo. Sed kiam generalo Bastien proponis al Wüster reprezenti Esperanton en Budapeŝto okaze de priroda konferenco, Wüster respondis jenon (1936 07 29):

". Jam nun mi diru, ke mi persone ne povus reprezenti Esperanton, ĉar mi partoprenas en la kodaj laboroj ne por defendi speciale la interesojn de Esperanto.

Ŝajnas ke Esperanto povus rezigni prezenti proprajn tradukaĵojn. Sufiĉas diri, ke oni lasas al la aŭtoroj de la soveta projekto, kiu estas bazita sur la ĉefaj principoj de Esperanto, traduki la specimenojn laŭ sia propra opinio."

Do en la kontraŭfundamenta argumentado de Drezen oni trovas la kialon de la alia flanko de la medalo kaj la respondojn al la demandoj de d-ro Vetter.

Kompilis: Marcel Delcourt
Jean Amoureux

Ĉiurilate modela verko

Recenzas William Auld (Skotlando):

Slovaka antologio. Elekto: Jozef Velký. Traduko: Jiří Kořínek, Štefan R. Seemann, Pavel Rosa, Magda Šaturová, Miloš Lukáš, Eduard V. Tvarožek, Ján Valaššan-Dolinský. Bratislava: Slovaka Pedagogia Eldonejo, 1977. 538p. 21 cm.

Mi volas unuavice substreki, ke tiu ĉi estas ĉiurilate modela verko. La pretigon de simila antologio oni povas aliri laŭ diversaj vidpunktoj. Ekzemple, oni devas decidi anticipe, ĉu limigi la nombron de la verkistoj reprezentotaj kaj traduki iom longajn kontribuojn el malpli da aŭtoroj, aŭ doni kiel eble plej larĝan perspektivon tra la koncerna literaturo per relative mallongaj tradukoj el tre multaj aŭtoroj. La slovakoj elektis la duan alternativon.

Rezulte, enestas kontribuoj el ne malpli ol 85 diversaj aŭtoroj, kaj tio ne enkalkulas plurajn sekciojn anonimajn sub titoloj kiel “Baroka amliriko” k.s., el kiuj unu — “La popola kanto” — eĉ donas, gratulinde, ankaŭ muziknotojn! Tio kondukas nin de la 9a jarcento ĝis hodiaŭ. Ne mankas ankaŭ longa enkonduka studo “La slovakaj literaturo en kunligo kun la monda”.

Aldone al ĉio ĉi, ĉiu aŭtoro estas individue prezentita per detala biografio antaŭ sia parto, kaj tre multaj el ili eĉ koniĝas al ni per sia portreto.

La libroprodukta tekniko estas unuaranga: bona papero, klara preso, estetike plaĉa aranĝado de la materialo. Tio nepre menciindas en la nuna mondo!

Oni ne povas diri, ke la slovakaj troviĝas inter la internacie plej konataj literaturoj. Pro tio la nuna volumo estas aparte valora, ĉar kiu legas ĝin, tiu en la fino havas fortan impreson de multjarcenta tradicio kaj popola fiero. Por multaj, estos novaĵo ekscii, ke la slovakoj estas tiel same malsimilaj al la ĉeĥoj kiel la skotoj estas al la angloj. Parolante pri tiaj aferoj, mi rajtu diri ke, trovinte la aŭtoron Vladimír Roy mi ekinteresiĝis, ĉar Roy estas skota familia nomo, kaj tio estis la familia nomo de mia patrino. Vi povas imagi mian surprizon, kiam mi legis pri li: “Li naskiĝis en Kochanovce. Teologion kaj filozofion li studis en Bratislava kaj en Skotlando”! Ĉu eble mi estas lia parenco, “en malproksima grado”, kiel skribis poeto?

La tradukoj ĉiam allogas, ofte brilas. Ege plaĉas al mi la stilo de la tradukintoj — nu, precipe en la prozaj partoj. Niaj kriterioj pri poemtradukado en Esperanton estas jam delonge tre rigoraj, ĉar ni havas majstrojn pri tiu arto. Ĉi tie, tre multaj tradukoj brilas,

dum kelkaj malpli kontentigas pro plateco aŭ ne tro belaj solvoj — kaj, interese, ofte la sama tradukinto aperas en ambaŭ kategorioj. Tio signifas juĝi, kompreneble, laŭ la plej alta nivelo: substrekindas, ke vere neniuj poemtradukoj estas aĉa aŭ tute banala. La prozo estas pli ol senriproĉa — ĝi havas kvalitojn pozitivajn, tiel ke la volumo meritas studon eĉ el vidpunkto de la akirado de bona Esperanta stilo.

Kion diri pri la enhavo? Klare, inter tiom da diversaj aŭtoroj kun meznombro po du kontribuoj, elekto de plej ŝatindaj pecoj estas ekskluzive subjektiva. La gamo estas tre larĝa, de la kampareca ĝis la mondumeca, de la tragedia ĝis la bonhumora. Prefere mi diru, ke leginte la tuton oni ricevas tre reliefan bildon pri la vivo en unu lando dum jarcentoj. Oni ricevas fortan impreson pri la ŝatindeco de la slovakaj karakteroj kaj la konindeco de la slovakaj kulturo. Laŭ tiu vidpunkto ĝi estas la plej “kompleta” tia antologio en Esperanto ĝis nun.

La klero de la elekto, la sindediĉo de la tradukintoj, la detala kompletado de la rezultinta volumo, ĉiuj invitas nur nian dankeman gratulon. Kaj gratulon ne malpleje meritas la Slovaka Pedagogia Eldonejo.

Mendu ĉe UEA: 18,00 (por Nederlando 18,72) gld., plus sendokostoj 10%.

BELARTAJ KONKURSOJ 1978

Originala poezio; Tria premio:

La turoj de l'ĉefurbo

Kie mi kaŝos
la nigrajn ŝtormojn?
En la cerbo, en la cerbo.

La tajdo de miaj tagoj
mute alternas;
griziĝas miaj longaj
longaj
haroj, kaj interne,
ĝuste je l'centro de l'kormuskolo
kancero nestiĝas.
Multajn mesaĝojn mi jam sendis
al la blankaj turoj de l'ĉefurbo,
sed responde
fluida rivero de nigraj ombroj
elfontis, kaj surde,
obtuze,
ĝis la cerba turbino ĝi dilatiĝis.
Flosas do senutile
la ruĝaj flokoj de Espero;
jam ĉie ĉeestas
infanoj neniam naskotaj.

En la cerbo, en la cerbo.

Mauro Nervi

Sepdekjara freŝo

Recenzas Rejna de Jong (Nederlando):

La revizoro (1836) de N.V. Gogol (1809-1852). El la rusa tradukis (1907) L.L. Zamenhof. Osaka: Japania Esperanta Librokooperativo, 1978 (represo de la 2a eldono). 99p. Bind. 21cm.

Jam plurfoje niaj eldonistoj ĝojigis nin per valoraj represo. Jen kuŝas antaŭ mi unu el la fruaj tradukoj de Zamenhof. La komedio de Gogol sendube amuzos ankaŭ la nunajn esperantistojn. Krome ili ĝuos la ankoraŭ freŝan lingvon de Zamenhof: Li tradandis en la vojo la monon (p.21); La infanteria kapitano forte min forkis (p.24). La libro, bindita kaj bonaspekta, estos aparte bonvena al tiuj novaj adeptoj de la lingvo, kiuj deziras studi la verkojn de ties iniciatinto.

Mendu ĉe UEA: 19,50 (por Nederlando 20,28) gld., plus sendokostoj 10%.

Surprizaj novaĵoj pri Zamenhof

Recenzas N.Z. Maimon (Usono):

Halina-dokumento pri la studentaj jaroj de L.L. Zamenhof. Oosaka: Juntaro Iŭaŝita, 1977. 230+22p. 24cm.

La zamenhofologio progresas per gigantaj paŝoj. Kaj ĝi ne plu estas monopolo de la Okcidento. Japanujo suriris la scenejon kaj produktas interesajn eldonaĵojn. Jen la grandioza verko de Ludovikito – kvin luksaj volumoj de zamenhofaĵoj, kaj baldaŭ sekvos la sesa. Ankaŭ *La kaŝita vivo de Zamenhof* portas la stampon de tiu lando. Kaj nun nova libro aperis: la *Halina-dokumento*.

En tiu ĉi libro estas kolektitaj 113 dokumentoj el la arkivoj de la gimnazio kaj universitato de Varsovio. Enestas la rusaj originaloj, kun precizaj esperantlingvaj tradukoj, paĝon kontraŭ paĝo, bonorde aranĝitaj, kaj je la fino interesplena, scienca komentario de N. Kawasaki. (La eldoninto enigis ankaŭ la 13 dokumentojn el la Moskva Universitato, publikigitajn antaŭe en la zamenhofa numero de *La nova epoko*, decembro 1929).

Ĉion ĉi Halina Edelbaum – antaŭ la dua mondmilito – elfosis, zorge kopiis, esperantigis kaj tajpis. Dank' al ŝia sindediĉo, sub malfacilaj cirkonstancoj, ni posedas nun tiun valoran kolekton, kiu ebligas pluesplori la junaĝajn jarojn de Zamenhof, la studentan periodon. Pro manko de dokumentoj ni preskaŭ nenion sciis pri la internaj kondiĉoj en la rusaj altlernejoj.

Halina – juda esperantistino en Varsovio – jam ne vivas. Ŝi estis murdita de la nazioj, kune kun la ceteraj milionoj. Tial, je ŝia memoro, la libro aperas sub la titolo *Halina-dokumento*.

Detala analizo estas afero de fakuloj. Ĝi sendube sekvos. Sed jam nun mi povas malkaŝi, ke enestas surprizaj novaĵoj, tute nekonataj, kiuj interesos ĉiun seriozan esperantiston.

Mendu ĉe UEA: 45,60 (por Nederlando 47,42) gld., plus sendokostoj 10%.

Por laŭtlegi

Recenzas Eliza Kehlet (Belgio):

Ĉevalido transiras riveron de Min. Jang. Trad. el la ĉina. Pekino: Fremdlingva Eldonejo, 1976. 16p. Kolorilus. 18cm.

Laŭdon meritas *Ĉevalido transiras riveron*: ĉarma eldonaĵo en belaj koloroj kun nek tro longa, nek tro komplika teksto, kiu facile laŭtlegeblas. Mi povas plene subteni ĝian moralinstruon, ke infanoj (4-7-jaraj) lernu pensi memstare.

Ruza griza lupego de Giang Ginĉeng. Trad. el la ĉina. Pekino: Fremdlingva Eldonejo, 1976. 26p. Kolorilus. 18cm.

Kontraŭe, la alia kajero, *Ruza griza lupego*, malplaĉis al mi tiom, ke mi entute ne uzis ĝin por miaj infanoj. Dolĉaj bestidoj fariĝas kruelaj monstroj, mortigante lupon, kiun ili kaptis per ruzo, antaŭ ol montriĝis, ĉu li entute malbonfarus.

Tian dogman, etmensan antaŭjuĝemon infanoj renkontos ankoraŭ sufiĉe frue, bedaŭrinde, – la miaj ne renkontu ĝin jam nun en laŭtleĝaĵo de gepatroj. Cetero, nek la ilustraĵoj, nek la lingvo atingas la nivelon de la unue priparolita libreto.

Vilaĝano el Poltavo. Ukraina popolanekdoto. Zŭrich: Mondo, 1976. 16p. 16cm.

Jen kajereto en dukolora preso, kiun mi volus rekomendi por la pli aĝaj infanoj, ekz. ekde 7/8 jaroj. La rakonto estas, escepte de la du unuaj frazoj, tute en dialoga formo, kio postulas relative lertan legokapablon. La sentruda, iom ironia humuro direktiĝas al ne tute juna infano.

Certe la kajero pro sia modesta amplekso kaj pro la facila, sed bona lingvo estus bonvena kompletigo por kursoj – kaj por infanoj kaj por plenkreskuloj (la teksto ja estas prenita el kursa lernolibro).

Mendu ĉe UEA: *Ĉevalido transiras riveron* kaj *Ruza griza lupego* po 0,90 (por Nederlando po 0,94), *Vilaĝano el Poltavo*: 3,00 (por Nederlando 3,12) gld., plus sendokostoj 10%.



Laste aperis...

Antikva Rigo, La. El la latva trad. Ed. Jaunvalks. Rigo: Eldonejo "Liesma", 1978. 17cm. Fotoj. 48p. (nenumritaj). Prezo: 3,00 gld.

Amo de Danto Alighieri, La. Trygve Müller. Ascoli Piceno: Gabrielli, 1978. 115p. 20cm. Plejado 8. Historia dramo kun agado en la periodo 1289-1302, pri la amo inter Beatrica kaj la aŭtoro de *La Dia Komedio*. Prezo: 14,10 gld.

25 jaroj; Antologio de Belartaj Konkursoj. Redaktis W. Auld (poezio) kaj V. Benczik (prozo). Budapeŝto: Hungara Esperanto-Asocio, 1977. 19cm. 207p. ISBN 963 571 005 4. 36 originalaj kaj 7 tradukitaj poemoj; 11 originalaj noveloj. Kvazaŭ suplemento al *Esperanta antologio* kaj 33 rakontoj. Kun enkonduko de H. Tonkin kaj skiza historio de BK de B. Ragnarsson. Prezo: 16,20 gld.

El la "Verda Biblio" (1935), Izrael Lejzerowicz (1901-1944). Budapeŝto: Hungara Esperanto-Asocio, 1978 (2a eld.). 83p. Ilus. 18cm. ISBN 963 571 036 4. Klasika satiro pri la Esperanto-movado antaŭ la Dua Mondmilito. Kun la "babiladoj kun Horaĉo Serĉer" (inkluzive de unu ne aperinta en la unua eldono). Klariĝaj notoj. Prezo: 9,60 gld.

Etiko I (1924), P. Kropotkin (1842-1921). El la rusa trad. I.S.A. B. (1924). Laroque Timbaut: La Juna Penso, 1979 (fakte 1978; dua eld., lingve reviziita). 132p. Mimeo, 21cm. Anarkisma. Prezo: 6,00 gld.

Filoj de l' ŝtonkora homo, La (1869), Mór Jókai (1825-1904). Adaptis Tibor Cs. Horváth. Desegnis Pál Korcsmáros. El la hungara trad. Vilmos Benczik. Budapeŝto: Hungara Esperanto-Asocio, 1978. 60p. Ilus. 24cm. Komiksa (bildstria) adaptaĵo de romano pri tri fratoj, kiuj rolas en la kontraŭ-habsburga ribelo de Hungario (1848-9). Prezo: 7,20 gld.

Ĝardeno de la urbestro, La, Lina Gabrielli. Ascoli Piceno: Gabrielli, 1978. 109p. 20cm. Plejado 9. Aŭtobiografia novelaro, kiu aperas en Esperanto kaj en la itala. Prezo: 14,10 gld.

Knaboj de Paŭlo-strato, La (1907), Ferenc Molnár (1878-1952). El la hungara trad. Ladislao Somlai (1937) Budapeŝto: Hungara Esperanto-Asocio, 1978 (2a eld., fotoreprese). 180p. 19cm. ISBN 963 571 039 9. Romano pri bataloj inter knabobandoj. Prezo: 16,20 gld.

Kolora kalejdoskopio; Elektitaj tradukaĵoj. El la ĉeĥa kaj la slovak trad. Miloš Lukaš (1897-1976). Prago: Ĉeĥa Esperanto-Asocio, 1977. 75p. 20cm. Poemoj kaj prozaĵoj diversspecaj. Kun kvin poemoj de Zamenhof en ĉeĥa traduko. Prezo: 4,20 gld.

Lumo de orienta Eŭropo (1963), Vladimir Beekman (1929-). El la estona trad. H. Dresen, J. Ojalo kaj H. Saha. Red. H. Seppik. Tallinn: Eesti Raamat, 1978. 48p. Ilus. de H. Laretei. 17cm. Sepĉapitra poemo pri la socialisma revolucia ondo en Eŭropo. Unu ĉapitro, "Lingvo de kamentubo", pritraktas Zamenhof kaj Esperanton. Prezo: 3,60 gld.

Projekto de racia nacia monsisistemo (la mona revolucio), Jozef Hartl. Vieno: La aŭtoro, 1978. 40p. 20cm. Internacia diskutejo 5. Prezo: 8,10 gld.

Słownik esperancko-polski, Andrzej Pettyn (1937-). Warszawa: Polski Związek Esperantystów, 1977. 172p. Mimeo. 20cm. Prezo: 6,00 gld.


Słownik polsko-esperancki, Andrzej Pettyn (1937-). Warszawa: Polski Związek Esperantystów, 1977. 91p. Mimeo. 21cm. Prezo: 3,00 gld.

Studlibro por kandidatoj por la Aŭstralia Norma Supera Diplomo, Kenneth G. Linton (1905-). 3+31p. 21cm. Pri gramatiko kaj vortuzado, kun multaj ekzemploj. Prezo: 6,30 gld.

LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando, ne akceptas mendojn, kiuj ne atingas la minimuman mendosumon de 15,— guldonoj. Al la netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Nederlando aldoniĝas 4% kaj al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 18% por la enlanda imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por la sendokostoj. Tamen, la sumo de la sendokostoj estas minimume 3,— gld.

Tuj aĉetu numeron nul de

SEMAJNO



internacia magazino sendependa

unika aktuala semajna revuo en la internacia lingvo, kun multaj interesaj artikoloj sur 40 paĝoj. Leginda por esperantisto de ĉiu lando, ĉiu aĝo, ĉiu medio.

Konvinkiĝu mem!

Vi ricevas numeron nul (provnumeron) de SEMAJNO kontraŭ pago de 3,—gmk al poŝtkonto Nbg 65092-858 (S. Maul, Semajno, Augsburg) aŭ sendo de 4 internaciaj respondkuponoj (aŭ pago alimaniere) al

S. Maul, SEMAJNO, Singerstrasse 1/III, D-8900 Augsburg, FR Germanio.

Grupoj ĝuas rabaton de 10%

ĉe mendo de pli ol 5 ekzempleroj. Subskripcia kampanjo nur ĝis meze de decembro 1978!

Klare skribu vian adreson!

Ĉi tiun rubrikon redaktas: IAN JACKSON, 6A Eastcombe Road, WESTON-SUPER-MARE, Avon, BS23 2TQ, Britio.

EKSTERAJ RILATOJ DE TEJO:

KER – mallongigo kun taskoamplekso

KER estas la Komisiono pri Eksteraj Rilatoj de TEJO, la plej malnova el la kvar konstantaj komitataj komisionoj. Kiel funkcias KER? La gvidanto de la komisiono, ĉiam estrarano de TEJO, regule cirkuleras al komisionanoj, disdonante taskojn. La respondoj kaj raportoj, kiuj revenas, resume aperas en la sekvanta cirkulero. Tiel la ŝarĝo de la laboro estas distribuata iom juste.

KER foje havis, kaj nun denove havas, duoblan strukturon. Ĝi diferencas de la aliaj komisionoj, havante oficejon, kie deĵoras dungita junulo, kiu estas ekster la estraro. Ĝis 1977 KER havis plentempan deĵoranton, pagatan per donacoj kaj per subvencio de la Eŭropa Junulara Fonduso de la Eŭropa Konsilio. Sed tiu subvencio ĉesis, kaj ne plu eblis pagi deĵoranton plentempan. Tamen, la Estraro de TEJO faris kuraĝan decidon refunkciigi la oficejon, uzante la neabundajn monrimojn de TEJO por aĉeti parton de la labortempo de unu el la anoj de la Volontula Servo de UEA.

Kial do KER bezonas oficejon kaj oficiston? La adreso de KER estas tiu adreso de TEJO, kiun konas ekstermovadaj junularaj organizoj. KER rilatas kun dekoj da ili, informante kaj informate per revu-interŝanĝoj kaj partoprenado en seminarioj kaj konferencoj. Tial necesas konstanta adreso, ampleksa aro da dosieroj kaj iu kun plena superrigardo de la multifaceta laboro.

KER havas kvar agadmanierojn: reprezentiĝo en konferencoj de aliaj organizoj, aranĝo de propraj seminarioj, informado pri Esperanto en labortendaroj, eldonado. Ĉi-jare TEJO reprezentiĝis en nur tri kunvenoj, ne pro manko de invitoj, sed pro netrovo de surlokaj reprezentantoj. La seminarioj de KER havas altan reputacion en la Movado kaj ili eĉ ricevis la benon kaj (pli grave) la subvenciojn de la Eŭropa Junulara Fonduso. Jam estas tri proponoj por seminarioj dum 1979: unu el ili en la kadro de la 35a IJK en Austerlitz. Aktuala demando estas, ĉu resti ĉe nur lingvaj temoj, kiel antaŭe, aŭ plilarĝigi la repertuaron de KER kaj trakti ankaŭ aliajn mondproblemojn.

Foje KER peris informojn pri labortendaroj por junuloj, organizitaj de la movadaj aŭ aliaj instancoj, kie eblis lerni Esperanton. KER mem aranĝis kursojn en pluraj labortendaroj. Leteroj de neesperantistoj fluas ankoraŭ amase al la oficejo, sed proponoj pri labortendaroj mankas aŭ venas lastmomente.

La eldona laboro de KER estas malofte vidata de la movada publiko. Ĝin konsistigas plejparte raportoj pri seminarioj, kaj periodaĵoj. *Sufoko*, nia gazeto de nacilingvaj eltondaĵoj pri la lingva problemoj, ĉiu kun traduko en Esperanto, estas utila por la propaganda laboro de ĉiu esperantisto. Numero 8 ĵus aperis, la unua de la nova redaktoro, Joan Moretó i Reventós (Dalmases 20, Barcelona 17, Hispanio). Li volonte ricevos artikolojn pri la lingvo-problemo, tonditajn el viaj ĵurnaloj kaj revuoj nacilingvaj, prefere kun traduko en Esperanto. Aboni tri numerojn de *Sufoko* kostas 10,00 gld. pagendaj al la Centra Oficejo de UEA/TEJO (kun indiko de la pagocelo). Nia bulteno por la ekstero, *NNN* (Nouvelles, News, Novaĵoj) aperadis angle, france kaj Esperante, kaj estis sendita al la organizoj kun kiuj ni havas rilatojn. Ĝi reaperos tre baldaŭ.

Rehavo de oficisto povus esti la eko de nova epoko por KER. Bonvenus novaj kunlaborantoj, kun novaj ideoj, por espereble rikolti novajn sukcesojn en ĉi tiu vasta agadkampoj.


Ian D. Tarrant

Agrable, sed...

ONI KUTIMIĜAS al oftaj gejunulaj renkontiĝoj en la beneluxa angulo de Eŭropo, kaj la apudeco de Britio, Francio kaj FR Germanio garantias pli ol nur nacian etoson. De la 27a ĝis la 29a de oktobro – jes, tiel freŝa novaĵo – Belga Esperanta Junulara Asocio kunvenigis okdekon da homoj en la urbeto Essen, por semajnfino kun ĝenerala temo "Belgaj/germanaj kulturinterŝanĝoj". Tamen, la programo estis ĉefe distra, kaj la elektita temo instigis malmultan intereson aktive pritrakti ĝin. Aliflanke, internacia kunveno, eĉ regiona, necese implicas interŝanĝojn. Sed, ĉu valoras impone titoli renkontiĝon, al kiu oni venas sen intenco vere labori? Essen estis agrabla okazo pasigi semajnfino kun konatoj.

Homaj rajtoj en IS

PLANITA multe pli frue, ol la Komitato de UEA proklamis la decembran Semajnon de Homaj Rajtoj kaj Esperanto (v. la paĝon 189), la 22a Internacia Seminario de Germana Esperanto-Junularo, inter la 27a de decembro 1978 kaj la 3a de januaro 1979, en Dümmerlohausen, traktos kiel sian ĉeftemon "Homaj rajtoj – teorio kaj realo". Ĉi tiu prestiĝa junulara aranĝo okazas ĉi-jare sub la aŭspicio de UEA. Kiel kutime en la junularaj aranĝoj dum la lastaj jaroj, ankaŭ en la 22a IS de GEJ funkcios pluraj laborgrupoj, en kiuj oni traktos la diversajn aspektojn de la temo. Pliajn informojn pri la 22a IS petu ĉe: Guido Brandenburg, Brinker Damm 24, D-4404 Telgte, FR Germanio. TEJO preparas numeron de sia revuo *Kontakto*, kiu traktos la seminarian ĉeftemon kaj do aperos antaŭ la jarfino. Tiu numero de *Kontakto* estos aparte aĉetebla, pri kio ni donos detalojn en posta revunumero.



IBSEN Brand

BRAND estas drama poemo de Henrik Ibsen (1828-1906), en majstra traduko de Erling Haugen, kiu tradukis ankaŭ "Peer Gynt" de la sama aŭtoro. BRAND aperas kiel 13a volumo en la Serio Oriento-Okcidento, sub aŭspicio de UEA. Antaŭparolo de H. Tonkin; postparolo de K. Kalocsay. 33+320 paĝoj. Ilustrita. 15x21cm. Lukse presita. Kolora kovrilo; plastumita bindo. ISBN 90 6336 004 5. Prezo: 21,00 gld. (Ekzistas tre limigita kvanto da fortike binditaj ekzempleroj po 33,00 gld.).

AULD PRI LINGVO KAJ ALIAJ ARTOJ

Esearo pri la originala kaj traduka Esperanto-literaturo, verkita de William Auld, unu el la plej gravaj kontribuantoj al tiu literaturo. 216p.; 14x21cm. ISBN 90 6336 006 1. Volumo 7 en la Stafeto-serio Movado. Kolora kovrilo. Prezo: 18,00 gld. Tio ĉi estas "nova" Auld, ne poeto, sed eseisto kaj kritikisto!

La Nova Butikisto de Nukugaia

Bertram Potts

La Nova Butikisto de Nukugaia

- kaj Aliaj Noveloj

kaj de Bertram Potts, novzelandano, kiu minacas konkuri la movadan libro-merkaton (en Japanio ĵus aperis alia verko de li). Tio ĉi estas facile legeblaj kaj amuzaj noveloj. 250p. 14x21cm. Bel-literatura eldonserio de Stafeto, n-ro 38. ISBN 90 6336 002 9. Prezo: 15,00 gld.

KUNHELPU PLUPORTI LA TORĈON!



STAFETO

WILLIAM AULD



PRI LINGVO
KAJ ALIAJ ARTOJ

Aĉetu libron de STAFETO por la Librotago — 15a de decembro.

MEMORU, ke la Libroservo de UEA vendas ĉiujn eldonaĵojn de TK / Stafeto kun 33-procenta rabato (ekde minimume 3 ekz.). Heideweg 20, B-2120 Schoten, Belgio.

Korea Respubliko

- Dum la lastaj jaroj ekzistis du landskalaj Esperanto-instancoj en Korea Respubliko, unu (Korea Esperanto-Asocio) rekonita de UEA kiel landa asocio, la alia (Korea Esperanto-Centro) rekonita de la korea registaro. Tiu malavantaĝa situacio nun ŝajne ĉesas per unuiĝo de la du grupoj sub la nomo Korea Esperanto-Asocio.

FR Germanio

- Regas ŝajne tre pozitiva epidemio en la Movado — ĉiu volas proprieti domon aŭ almenaŭ ĉambron por sia Esperanta agado. La plej freŝa novaĵo ĉi-rilate venas el FR Germanio: Hamburga Esperanto-Societo ekde decembro kunvenos en la propra klubejo, aĉetita post dekŝesjara kampanjo tiucela. La klubejo troviĝas ĉe Klaus-Groth-Str. 95, D-2000 Hamburg 26.
- En Freiburg (FR Germanio), jam tutan jaron funkcias iom nekutima Esperanto-rondo. Ĝi konsistas el homoj, kiuj ne nur komprenas la bezonon de komuna internacia lingvo, sed kiuj ankaŭ spertas la lingvan problemon senĉese, en sia ĉiutaga vivo, ĉe la laborloko, surstrate, en vendejoj, kinejoj, provoj informiĝi per radio aŭ televido ktp. Temas pri Esperanto-sekcio de la Klubo de Jugoslavaj Gastlaboristoj en Freiburg. La sekcion fondis malnova movada aktivulo, s-ro Jovan Oŝap, kiu nun laboras kiel socia aktivulo por siaj samlandanoj en tiu urbo. La sekcio tamen ne estas nur jugoslava, ĉar al ĝi aliĝis ankaŭ francoj kaj germanoj.

Madagaskaro

- Madagaskaraj esperantistoj venis dum ĉi tiu jaro en almenaŭ tri "on-doĵ" al Eŭropo. Temis pri entute kvin aktivuloj, kiuj inter aprilo kaj septembro vojaĝis tra la kontinento kaj provis iom rapide prezenti en prelegvesperoj, montri filmojn, informi pri la Movado en sia lando kaj informi pri la Movado en Eŭropo. Ĉio okazis iom haste, ne preparite, kio estis ankaŭ utila leciono.

Jugoslavio

- Sepdek kvin gejunuloj partoprenis en aŭgusto la 9an Internacian

Esperantistan Junularan Laborbrigadon, kiu laboris ĉe fervoj-konstruo en la centra parto de Jugoslavio. Inter la brigadanoj estis kelkdeko da eksterlandanoj (Germana DR, Francio, Hungario, Pollando, Turkio kaj Meksikio).

- Radio Split, la 4an de oktobro, anoncis formiĝon de la kvara Esperanto-societo en tiu marborda jugoslava urbo.

Britio

- Dum urba ekspozicio de Letchworth, kiu vizitis 60 000 personoj, fortan impreson faris Esperanto-stando, i.a. per afiŝo pri la subteno al Esperanto de 74 britaj parlamentanoj. Ĉe aparta stando radio-amatora, s-ro Ken Sly preskaŭ ĉiutage faris internaciajn kontaktojn per Esperanto.

Hispanio

- Ekde oktobro okazas prova kurso de Esperanto en la Filologia

Fakultato de la Universitato de Santiago de Compostela. Subtenajn salutojn oni sendu pere de s-ro Antono Alonso Núñez, Apt. 409, Santiago de Compostela, Hispanio.

Francio

- Unuiĝo Franca por Esperanto en septembro akiris novan proprieton kaj vastigis sian sidejon en Parizo. Oni antaŭvidas, ke la aldonitan spacon okupos ĉefe kursoj kaj kulturaj aranĝoj.
- Post prelego de s-ro René Llech-Walter, prezidanto de la Federacio "Langvedoko-Rusiljono", fondiĝis nova Esperanto-societo en la urbo Argelès-sur-mer (orientaj Pireneoj).

Nederlando

- Kelkaj studentoj kaj sciencistoj de la Teknika Universitato de Delft formis ĉi-somere studgrupon pri la lernado de Esperanto kaj la eblecoj de aŭtomata tradukado per Esperanto. Ankaŭ la periodaĵo de tiu prestiĝa teknika altlernejo, *THD Nieuws* (v. nian majan numeron, p. 104), kelkfoje publikigis tekstojn pri Esperanto kaj lingva demando ĝenerale.

Fake

Ekspozicioj

- Okaze de la Internacia Jaro de la Infano (1979) kaj la Jardeko de Aktivado por Kontraŭbatali Rasismon kaj Rasan Diskriminacion (la jardeko komenciĝis en 1973), Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj organizas grandan ekspozicion en la sidejo de Unesko en Parizo. La ĉeftemo de la ekspozicio estos "Ne rasoj, sed ni infanoj vivas en la mondo". Rajtas partopreni geknaboj 8-ĝis 15-jaraj, per fotoj kaj desegnaĵoj (maksimume: 29,7 x 42 cm.; minimume: 21 x 29,7 cm), kiujn oni titolu nacilingve kaj Esperante. La ekspoziciaj konkursaĵoj venu antaŭ la 1-a de januaro 1979 al: s-ro James Fairbank, 6 avenue Th. Rousseau, F-75016 Paris, Francio.

Libroj

- Dum la Frankfurta Libro-Foiro en oktobro, germana eldonejo Bleicher Verlag ekspoziciis i.a. du siajn novajn Esperantajn titolojn: *Trigroŝa romano* de Bertold Brecht



kaj *La perdita honoro de iu Katarina Blum* de Heinrich Böll. Tie vidiĝis ankaŭ la ĵus aperinta germanlingva aŭtobiografia verko de la konata esperantisto Hansjörg Kindler (Trikisini) el Luksemburgo, *La magiisto kun la blua ŝtono*.

Popoluniversitatoj

- Ĉe la 6a Internacia Konferenco pri Popoluniversitatoj kaj Konstanta Edukado, okazinta en la domo de Unesko en Parizo inter la 14a kaj 16a de septembro, s-ino B. Despiney-Zochoriska raportis en Esperanto kun interpreto en la francan. Pluraj aliaj esperantistoj (i.a. Pierre Petit, R. Llech-Walter kaj Jean Guillaume) ĉefrolis en tiu konferenco, kiun partoprenis plurdeko da personoj el ĉiuj landoj.

Interlingvistiko

- Dum la printempa trimestro (aprilo-junio) de la Universitato de Illinois (Urbana, Usono), okazos kurso pri "Internacia komunikado kaj planlingvoj", en kiu instruos prof. C.C.Cheng (lingvistika fakultato kaj Centro por Aziaj Studoj) kaj prof. Bruce Sherwood (fizika fakultato kaj Esplorlaboratorio pri Perkomputila Edukado).

Konkursoj

- La 18a sesio de la revivigita literatura konkurso (v. nian martan numeron, p. 64) Internaciaj Floraj Ludoj (Hispanio) ĉi-jare aljuĝis siajn ĉefajn premiojn al Kris Long (Britio), Simeon M. Simeonov (Bulgario) kaj Lina Gabrielli (Italio), ĉiuj pro poemoj; kaj al Bernard Golden (Hungario) pro prozaĵo.

Radiofonio

- Pro teknika problemo, la Esperantaj elsendoj de Portugalacia Nacia Radio estas nun aŭskulteblaj ekster la kutima frekvencaro, ĉe 12050 kHz. La portugalaj estas momente la plej klare aŭdeblaj Esperantaj elsendoj en Norda kaj Centra Ameriko. Notinde, la tempon por tiuj Esperantaj elsendoj oni forprenis de la elsendoj anglalingvaj.
- Esperantistaj kurtondaj aŭskultantoj fondis Internacian DX-Radio-Klubon. Por informoj sendu internacian respondkuponon al la prezidanto: s-ro D. Kretschmann, Postfach 730 453, D-2000 Hamburg 73, FR Germanio.

Gazetaro

- En la grava hungara semajna gazeto *Magyarország* (eldonkvanto proks. 500 000) aperis lastatempe du artikoloj tradukitaj el la revuo *Esperanto*, pri la irana movado kaj pri la lingva situacio ĉe UN.



Radioamatoroj

- Inter la instalaĵoj en la nova oficejo de Japana Esperanto-Instituto

estas radio-amatora aparato (identiga signo JA1YAR), per kiu oni provas fari kontaktojn ĉiuvendre dum duonhoru ekde la 12h00 GMT. La aparaton donacis s-ro Nakajima (JR1ISG).

Filmo

- Pri la ĉefaj konkursaj filmoj de la 21a Internacia Filmfestivalo en Karlovy Vary (Ĉeĥoslovakio) aperis du-lingva (ĉeĥa-Esperanta) informilo. Esperanto tamen ne estas ankoraŭ laborlingvo de la Festivalo, kie oni ĉi-jare provis interkompreniĝi ĉeĥe, ruse, angle, france kaj germane.

Personoj

Papo Johano Paŭlo la Dua

- Ekster la katolikaj rondoj de la Esperanto-movado verŝajne ne estas konate, ke la ĵus elektita Papo Johano Paŭlo la Dua estis alta protektanto de la 37a Kongreso de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista, pasintjare inter la 17a kaj 20a de aŭgusto en Ĉenstoĥovo, Pollando. Lia Papa Moŝto tiutempe estis ĉefepiskopo de Krakovo sub la nomo Kardinalo Karolo Wojtyla. Ni memorigu ĉi-okaze ankaŭ pri la granda simpatio, kiun Esperanto ĝuis flanke de la en aŭ-

gusto forpasinta Papo Paŭlo la Sesa (pri kio amplekse skribis *Espero katolika*, n-ro 10-11, 1978).

Harabaĝiu

- S-ino Ĝigi Harabaĝiu (Usono), honora membro de UEA, donacis monrimedojn por dekfoja atribuo de premio por la plej bona ekster-sceneja uzo de Esperanto inter la rolantoj en la Pupteatra Internacia Festivalo. La premio portas la nomon de Jozefo Petrin, rumana Esperanta pioniro, forpasinta en 1975.

Oficiala Informilo

N-ro 519

NOVA ĈEFDELEGITO DE UEA POR ARGENTINO



Ekde la 1-a de januaro 1979, Argentino havos novan Ĉefdelegiton de UEA. Li estas s-ro Hugo A. Lingua (sur la foto), delegito kaj fakdelegito en Rosario (Santa Fe). Adresoj: Casilla de Correo 278 aŭ Rio Bamba 773; telefono 81-1041. S-ro Lingua estis dum multaj jaroj aktiva kunlaboranto de la Informa Fakto de UEA, eldonanto de *Lerneja Esperanta Revuo* kaj organizanto de korespondaj kursoj. S-ron Lingua elektis Argentina Esperanto-Ligo laŭ propono de s-ro Curt Mil-kuschutz, kiu retiriĝas post pli ol 20

jaroj da akurata kaj konscienca servado en tiu funkcio. Al li ni adresas plej varman dankon pro la pasinta kunlaboro kaj subteno.

NOVA ĈEFDELEGITO POR USONO

Ekde la 1-a de septembro jam funkcias nova ĉefdelegito por Usono, kie la administrado estis provizore en la manoj de la Centra Oficejo de ELNA de post la retiriĝo de s-ro A.F. Doneis. La nova funkciulo estas s-ino Bonnie Helmuth, multjara membro kaj delegito de UEA kaj, cetere, profesia kontistino. Sekvos anonco pri nova poŝtkesta adreso, ĝis kio plu validas tiu en Jarlibro 1978, p.29.

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

NEDERLANDO: Mag. H.C. Timmer; A.J.B. Vrolijk-Hemelman.

SOCIETO ZAMENHOF 1978

BRIT: 209 J. Brownlee. NED: 210 W.C. Keizer; 211 A.W. van der Waal. NORV: 212 Pepita de Caspary. SVED: 213 Emy Lindmark; 214 F. Nordberg. US: 215 Alberta S. Casey; 216 John L. Lewine; 217 Margaret O. Vick.

DONACIOJ 1978 (Gld.)

ĝis la 30a de septembro

FONDAĴO AZIO-AFRIKO: FR Germanio: H. Schindler 21,40. Diversaj malgrandaj: 5,63. Sumo ĉi-jara 2 659,69.

FONDAĴO CANUTO: FR Germanio: H. Franck 43,44. Diversaj malgran-

daj: 7,60. Sumo ĉi-jara: 1 955,89.

ĜENERALA KASO: FR Germanio: Ruth Paintner-Trumpp 1 623,20. Nederlando: R. Moerbeek 23,25. Svedio: E. Lindmark 34,06. Usono: M. Starr 216,60. Diversaj malgrandaj: 3,55. Sumo ĉi-jara 10 759,33.

PATRONOJ DE TEJO: 21 J. Azcuénaga Vierna, Hispanio. 22 W. Th. Oeste, FR Germanio. 23 J.S. Douma, Nederlando.

PROPAGANDA KONTO: Diversaj malgrandaj: 4,50.

AGADO ĈE UN KAJ UNESKO: Nederlando: E.S. Otto 25,00. Sumo ĉi-jara: 1 278,19.

Al ĉiuj tre koran dankon!

UEA

ekzameno



Redaktas: B. Golden,
Csikász u. 11.III.3
H-8200 Veszprém, Hung.

RESPONDO 22

(pri la demando vidu nian oktobran numeron.)

a. En 1887 la Amerika Filozofia Societo en Filadelfio nomumis komitaton por esplori la internacilingvan demandon. La komitato ne akceptis Volapukon, kaj en suplementa raporto prezentita en 1888, favoris Esperanton. En 1889 la Societo eldonis anglan tradukon de la Unua Libro de d-ro Zamenhof.

b. W.H. Trompeter (1839-1901) vizitis R.H. Geoghegan (1866-1943), kiu post elmigro de Britio en 1891, loĝis en la urbo Eastsound sur la insulo Orcas en la ŝtato Vaŝingtono en la okcidenta parto de Usono.

c. Prof. Wilhelm Ostwald (1853-1932) prelegis ĉe la universitato Harvard en Kembriĝo, Masaĉuseco. Kvankam li daŭre apogis la ideon de internacia lingvo, li ne longe restis en la Esperanto-movado, sed turnis sin al aliaj planlingvaj projektoj, ĉiuj fiaskintaj.

ĉ. En 1908 en Ĉikago aperis 65-paĝa libreto kun la titolo *Manifesto de la Komunista Partio*. La tradukinto estis Arthur Brooks Baker (1877-1973) el Kalifornio, aktivulo

en la frua Esperanto-movado en Usono.

d. En 1908 Edmond Privat (1889-1962) ĉeestis la unuan usonan Esperanto-kongreson ĉe la lago Chautauqua en la okcidenta parto de la ŝtato Nov-Jorko. En tiu fama somerumejo estis aranĝitaj prelegserioj pri diversaj temoj, por ke la vizitantoj ne nur ripozu sed ankaŭ edukiĝu.

e. La 6a Universala Kongreso okazis en 1910 en la ĉefurbo de Usono, Vaŝingtono.

f. La 11a Universala Kongreso estis organizita de D.E. Parrish en San-Francisko, Kalifornio. La 163 ĉeestantoj estis usonanoj kaj kanadanoj.

g. Dum britoj aŭdis Esperanton tra la etero de Londono, samjare en 1922 usonanoj apud la urbo Newark en la ŝtato Nov-Jerzejo kaptis eksperimentajn programojn de la sendostacio XYZ.

ĝ. Jozefo Silbernĉik (1850-1925) esperantistiĝis en 1891 kaj post sia elmigro al Usono, funkciis kiel UEA-delegito en Nov-Jorko.

h. 923 kongresanoj ĉeestis la 57an Universalan Kongreson en la okcident-usona urbo Portland en la ŝtato Oregono.

DEMANDO 23

(la respondo aperos en nia decembra numero)

Kvankam la ĉi-monata demando temas pri birdoj, oni ne devas esti ornitologo por povi respondi. Ĉu vi povas identigi jenajn dek birdojn, kiuj ne sidas en kaĝoj, sed troviĝas en diversspecaj verkoj en Esperanto?

1. Inter la postrestintaj tekstoj en pra-Esperanto, troviĝas la titolo de unu el la fabeloj de Hans C. Andersen, "La fiaro", kiu estas la nomo de birdo. Kiam Esperanto ricevis sian definitivan formon, Zamenhof denove tradukis la fabelon. Kiel ĝi nomiĝas?

2. Birdoj troviĝas en la titoloj de tri poemoj en *Fundamenta Krestomatio*. Krom la papago kaj cigno, kiu estas la tria birdo?

3. Kiu birdo aperas en la titolo de unuakta teatraĵo de la aŭstria teatraĵ-verkisto Arthur Schnitzler temanta pri la franca revolucio?

4. Ernst Toller, kiu estis malliberigita, priskribis en verslibro, kiel paro da birdoj eknestis en lia ĉelo kaj plurfoje rekonstruis sian neston, kiun gardistoj detruis. Kiuj birdoj rolas en lia libro?

5. En la finna epopeo *Kalevala*, la svatiganta heroo Lemminkäinen ricevas tri taskojn, kiujn li devas plenumi, antaŭ ol Louhi, la mastrino de Nordo, donos al li unu el siaj filinoj. Por plenumi la lastan taskon, li devas mortpafi birdon en Tuoni, la rivero de morto. Pri kiu birdo temas?

6. En la romano *Kiel akvo de l' rivero* (1963, 1977) de Raymond Schwartz, la ĉefrolanto Pierre Touchard konatiĝas kun du "birdoj" en la berlina lernejo, kie li instruas la francan lingvon. Unu estas la direktoro d-ro Vogel, kies familia nomo en la germana lingvo signifas "birdo". La alia estas la studento de la instituto, kies nomo estas tiu de stilzobirdo. Kiel nomiĝas tiu birdo en Esperanto?

7. Ramona van Dalsem el Nederlando, kiu ricevis la epiteton "Esperanta najtingalo" pro sia ĉarma kantado, verkis originalan kanton titolitan **La eta konkuranto**. Temas pri birdeto, kiu konkuras, kiam la aŭtorino kantas. Kiel nomiĝas tiu birdo?

8. La plej fama poemo de la usona poeto kaj novelisto Edgar Allan Poe estis esperantigita de Leopoldo H. Knoedt, brazila esperantisto. Kiu birdo donis sian nomon al la titolo de la poemo?

9. Albert Goodheir el Skotlando verkis originalan poemaron, kies titolo enhavas la nomon de nigra birdo. Kiu estas tiu birdo?

10. La Esperanta fakorganizaĵo okupiĝanta pri birdoj estas Ornitologia Rondo Esperantlingva (ORE). Kiel nomiĝas ĝia kvaronjara organo, kies titolo estas la nomo de birdo?

Anoncetoj

TARIFO: Ĉiu vorto kostas 0,75 gld. (1 int. resp. kup.). Pri la enhavo respondecas nur la anoncantoj mem.

D-rino Flora Szabó-Felső, estrarano de UEA, havas novan adreson: Zója u. 5/b VII.22., H-7624 Pécs, Hungario.

Roman Treitz (12) kaj **Dorian Treitz** (7), Ludolfstr. 60/I, D-2000 Hamburg 20, FR Germanio, serĉas korespondantojn tra la tuta mondo.

36-jara komencanto kaj pacista naturo deziras perfektigi en la Internacia Lingvo korespondante kun tutmondaj samideanoj: s-ro Daniel Houguet, 13, rue de la Pradonnais, F-44350 Guérande, Francio.

La filoj de l' ŝtonkora homo, luksa bildrakonto kun atentoĉena enhavo, taŭgas ankaŭ por komencantoj. Libro furorinta en Varno. 64p., 7,20 gld. Mendu ĉe UEA. Revendistoj turnu sin al Hungara Esperanto-Asocio, Pf. 193, H-1368 Budapeŝto.

Ricevu liston de senkopirajtaj teknikaj artikoloj. Skribu al ELA, P.O. Box 17627, Ft. Worth, TX 76102, USA/Usono.

Tiuj, kiuj serioze okupiĝas pri folkloraj kantoj...: Goar Engländer, Thomasweg 3, D-4796 Salzkotten.



Studentino Halina Świątkiewicz, Osiedlowa 11, Pl-59-640 Świeradów, Pollando, serĉas amikajn kontaktojn kun okcidentanoj (junaj).

Atentu, metallaboristoj! Sindikata klubo en Svedio, loko proksime de Gotenburgo, atendas pruvon pri la avantaĝo de Esp. inter sindikatoj. Skribu, ni petegas, por instigi niajn membrojn partopreni kursojn por komencantoj. Se vi deziras korespondi, diru tion. Ni respondos al vi. Adresu: Metallaborista Klubo ĉe Kompanio ATLET AB, Pf. 138, S-435 01 Mölnlycke, Svedio.

PRI INTERNACIA LINGVO DUM JARCENTOJ, 2a eldono (XVI+320+10 paĝoj), favore akceptita de la Esperanta gazetaro, necesa por ĉiu serioza esperantisto. Mendojn akceptas aŭtoro: Isaj Dratwer, Bat Jam, Poŝtkesto 3396, Israelo kaj Libroservoj. Prezo: 30,00 ned. guld., plus 10% sendokostoj.

Baldaŭ aperos Rikardo Tria, Ŝekspir, trad. kaj enkonduko. John Francis. Antaŭ 1 Jan. 25% rabato, oni sendu £2.85. Kardo, 16 Woodlands Drive, Coatbridge ML5 1LE, Skotlando.

ĈINION mi vizitos trisemajne en aprilo 1979. Konsilojn, proponojn danke akceptos: Sune Ahlm, Nygatan 20 A, S-462 00 Vänersborg, Svedio.

HEROLDO

DE ESPERANTO

LA PLEJ POPULARA SENDEPENDA INTERNACIA ESPERANTO-ORGANO

De 57 jaroj je la servo de la Internacia Lingvo

- 17 numeroj jare
- Aktualaj ilustritaj raportoj el la tuta mondo
- Kultura paĝo pri literaturo, arto, muziko, sporto, kinoarto, ktp.
- Duobla Kongresa numero
- Libera Tribuno de la legantoj
- Literatura kaj scienca suplementoj

Jarabono: 440 belgaj frankoj aŭ egalvaloro.

Abonebla ĉe la Landaj Perantoj aŭ ĉe UEA (30,00 guldenoj; por Nederlando 31,20 gld.)

Mendu provnumeron ĉe la redakcio: Rue de la Reinette (Pippelingstraat) 13, bofite 28, B-1000 Bruselo

Redaktoro: Ada Fighiera-Sikorska

UNIVERSALA ALVOKO POR LA RATIFIKADO DE LA KONSTITUCIO POR TERA FEDERIĜO

Dum ĉi tiuj finaj tagoj de la 20-a jarcento kreskas la kompreno, ke ĉiu vivo sur la planedo Tero estas minacata de tuj okazonta detruo pro multaj kaŭzoj. Post jarmiloj kaj jarmiloj da laborego kaj batalado homoj opiniis, ke baldaŭ ĉiuj povus ĝui materian abundecon kaj vastiĝantajn perspektivojn. Sed nun evidentiĝis, ke la sama teknologio, kiu promesis abundecon, ankaŭ promesas universalan katastrofon eĉ pli rapide — se gravaj problemoj ne povos esti solvitaj sen plia prokrasto. Kiaj ajn iluzioj restas, ke paco kaj sekureco kaj homaj rajtoj estas atingeblaj per militismaj armiloj, ili estas forĵetendaj. Kiaj ajn iluzioj restas, ke adekvata progreso povos okazi per negocado inter suverenaj naciaj registaroj, por solvi la interrilatajn globajn krizojn alfrontantajn la homaron, ankaŭ ili estas forĵetendaj.

La neeskapebla alternativo por la hodiaŭa homaro estas la starigo de demokratia federa mondregistaro, provizita per adekvataj povoj kaj rimedoj por provizi kadron, en kiu supernaciaj problemoj povas esti solvitaj por la bono de ĉiuj. La bazo de demokratia mondregistaro, se ĝi servu juste al homaj bezonoj, estas konstitucio, kiu difinas la povon, la strukturon, la konsiston kaj la funkciadon de la mondregistaro, kiel ankaŭ la proceduron laŭ kiu ĝi estu starigita. Krome ĝi devas protekti la legitiman jurisdikcion de naciaj registaroj pri la internaj aferoj de la nacioj.

Dum la Asembleo por Mondkonstitucio, kunveninta de la 16-a ĝis la 29-a de junio, 1977, en Innsbruck,

Aŭstrio, partoprenantoj el 25 landoj el ĉiuj kontinentoj debatis kaj akceptis la malneton de **KONSTITUCIO POR TERA FEDERIĜO**. Ni, partoprenantoj de la Asembleo, kune kun aliaj subtenantoj, submetas nun la Konstitucion por Tera Federiĝo por tramonda ratifikado al la nacioj kaj al ĉiuj Teranoj.

La ratifikada proceduro estas difinita en la Konstitucio mem, en Artikolo XVII, Sekcio A. Prepara ratifikado estas petata de naciaj leĝdonaj instancoj aŭ de la naciaj registaroj de ĉiu lando. **Fina ratifikado estas petata de la homoj en ĉiu lando per popola referendumo.** Pro la urĝeco de la monda situacio estas devige, ke ĉiu nacia registaro kaj leĝdona instanco tuj entreprenu la necesajn paŝojn, por konsideri la Mondkonstitucion kaj realigi ĝian ratifikadon. Estas ankaŭ devige, ke la homoj en ĉiuj landoj per diversaj institucioj kaj rimedoj ekpaŝu, por akiri finan ratifikadon per popola referendumo.

Por sekurigi homan vivadon sur ĉi tiu planedo, kaj por ebligi al ĉiuj homoj realigi la pli grandajn kaj delikatajn potencialojn de vivado, ni petegas ĉiujn, kiuj ricevas ĉi tiun ALVOKON, akceli la ratifikadon.

Bonvolu konfirmi la agojn, kiujn vi entreprenos dum la ratifikada procedo, al la Asocio de Mondkonstitucio kaj Mondparlamento, kiu aranĝas la ĝeneralan ratifikan kampanjon, kun oficejoj en diversaj landoj kaj tutmonda Centra Oficejo ĉe 1480 Hoyt Street, Suite 31, Lakewood, Colorado 80215, Usono.

AMM havas membrojn en 50 landoj kaj jenan estraron: Kunprezidantoj: Reinhart Ruge, konstru-inĝeniero, Meksiko; A.B. Patel, sekretario de la Asocio por Mond-Unuiĝo, Hindujo; vicprezidantoj: d-rino Prachoomsuk Achava-Amrung, prof-ino pri edukado, Tajlando; d-ro Archie Casely-Hayford, eksministro, Ganao; prof. Gonzalo Fernos, medi-protektisto, Portoriko; Gerhard Havel, redaktoro, FR Germanio; Syed Muhammad Husain, juĝisto en la Plej Alta Kortumo, Bangladeŝo; Ahmed E.H. Jaffer, negocisto, Pakistano; Rev. Toshio Miyake, pac-gvidanto, Japanio; Thane Read, ekonomiisto, Usono; Helen Tucker, gvidantino por virinaj rajtoj, Kanado; ĝenerala sekretario: Philip Isely, verkisto, Usono; jura konsilisto: Max Habicht, internacia advokato, Svislando.



**TUTMONDA
DEMOKRATIO
La Racia Alternativo**

**ASOCIO POR MONDKONSTITUCIO
KAJ MONDPARLAMENTO**

1480 Hoyt St., Suite 31
Lakewood, CO 80215, Usono
(303) 233-3548

- ☐ Bonvolu sendi ekzempleron de KONSTITUCIO POR TERA FEDERIĜO, por kiu mi sendas \$ 5.00.
- ☐ Bonvolu sendi ekzempleron de CONSTITUTION FOR THE FEDERATION OF EARTH, por kiu mi sendas \$ 5.00.
- ☐ Bonvolu sendi pliajn informojn pri via organizo kaj pri la Kvinjara Plano por eviti tergloban katastrofon.

Nomo:

Adreso:

.....

Lando:..... Dato:.....

(Represo petata)

ĈINIO MALFERMAS LA PORDOJN

Politikistoj, ekonomiistoj, artistoj, sportuloj... ĉiam pli amase vizitas Ĉinion. Ili serĉas kontaktojn kun tiu granda regno, kiu malfermis siajn limojn. Inverse, Ĉinio kontaktas la ceteran mondon.

Ĉu ankaŭ vi ŝatas scii pri tiu vasta lando? Se jes, abonu la plurkoloran monatan gazeton *El Popola Ĉinio*, kiu estas la organo de Ĉina Esperanto-Ligo. Ĝi raportas pri ekonomio, kulturo, historio, politiko, geografio, sporto...

Mirige malalta abonmono, nome: por 1 jaro DM 6,—; por 2 jaroj DM 9,—; por 3 jaroj DM 12,—. Krome, ĉiujare la abonantoj ricevas grandan murkalendaron en Esperanto. Abonojn peras:

Libro-Servo de LEA/G; p.a. Gerhard Kunze
Panoramstr. 25; D-7290 Freudenstadt 1.

EN LA ZAMENHOF-TAGO, librojn kun alta lingva nivelo

Zamenhof lasis al ni la lingvon por ke ni perfektigu ĝin, ne por ke ni ĝin "modernigu". Por Fundamenta Esperanto sen eraroj legu la verkojn de L. Mimó:

Du komedioj: Tamen civilizitaj kaj Neĝobulo.
Kompleta Lernolibro de Regula Esperanto.
Perfektecio de la Esperantaj verboj.



Ĉina monata gazeto en Esperanto



varbas abonantojn de 1979

Periodo de abonvarba kampanjo: Ekde la 1-a de oktobro 1978 ĝis la 31-a de januaro 1979. Ĉiu, kiu faras abonon aŭ reabonon en la varb-kampanjo, povos senpage ricevi unu ekz. de grandformata kolora kalendaro en Esperanto.

Abonprezoj: Por 1 jaro: Gld. 7,00; por 2 jaroj: Gld. 10,50; por 3 jaroj: Gld. 14,00.

Abonvarbado estas bonvena. La abonvarbanto sendu la kolektitajn abonilojn kaj pagojn al la loka peranto, petante ke la lasta notu lin kiel varbanton. Oni ankaŭ povas sendi ilin rekte al la Esperanta Sekcio de GUOZI SHUDIAN. Post plenigo de la aboniloj la abonvarbanto povos ricevi memoraĵojn kun ĉina stilo.

Abonu ĉe: UEA, Nieuwe Binnenweg 176
3015 BJ Rotterdam, Nederlando
aŭ rekte ĉe la ĝenerala distribuanto:
Esperanta Sekcio de GUOZI SHU-
DIAN. P.O. Kesto 313. Pekino, Ĉinio
Specimeno akirebla ĉe la ĝenerala distribuanto.

Pensu pri beleco

uzante sur viaj ko-
respondaĵoj la al-
logan trikoloran
glumarkon! Cent
markoj kostas 8,25
(por Nederl. 9,60)
gld., kio inkluzivas
la sendokostojn.



Mendu ĉe via libroservo aŭ ĉe la Libroservo de UEA,
Nwe. Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederl.

Gevafax X-21 universal.

**Ĉar tiom da fotokopiiloj
similas unu la alian**



- kopioj sur diversaj paperspecoj
- malvarmaj kopioj (fikssistemo per fulmo)
- silentaj aparatoj
- sen varmigperiodo

Gevafax X-21 universal estas nur unu kopiilo inter la fotokopiiloj de Agfa-Gevaert

AGFA-GEVAERT N.V.
SEPTESTAAT 27
B-2510 MORTSEL (BELGIO)